

ESPERANTO

Internacia Revuo eldonata de Universala Esperanto-Asocio

Fondinto : H. HODLER. Redaktoro : D-ro Edmond PRIVAT. Direktoro de UEA : Hans JAKOB.

Adreso de la Redakcio kaj Administracio : 1, Rue de la Tour de l'Île, Genève.

ENHAVO: Internacia Skolta Tendaro, de Edm. Privat (105). — Suahili, helplingvo de Orienta Afriko (106). — Per nova akustiko al nova muziko (108). — Somera Universitato 1931 (108). — La vojo returne, fragmento (109). — La homo kaj la maro; Babilo: Poeziaĵoj de Baudelaire (111). — Aero, suno kaj akvo (112). — Tra la Mondo Esperantista: ICK de la Esperanto-Movado (113). — UEA: Al la ĉefdelegitoj kaj Delegitoj de UEA, akvoko de la Honora prezidanto (113). — Mondvojaĝo de l'speciala Delegito de ICK (114). — Esperantistaj problemoj: UEA kaj Naciaj Societoj (115). — Internacia Postkongreso Esperantista, Bialystok (116). — Naciaj kongresoj kaj antaŭkongresoj (116). — Internacia Cseh-Instituto (117). — Esperanto en Estonio (117). — Esperanto en Shanghai (118). — Festoj en Padova (118). — Turismo (118). — Internacia Polica Ligo (119). — Esperantista vivo, niaj mortintoj (119). — En kelkaj linioj (120). — Radio (120). — TEKA, kunveno (120). — Pilorio (120). — Reklamo (121, 122, 123, 124). — Aldono: Alvoko de l'Internacia Ligo de Virinoj por Paco kaj Libereco.

Internacia skolta tendaro

Ĉiu konas la skoltan movadon kaj ĝojas vidi geknabojn lerni helpemon kaj iom el praktika vivado sur kampo de l'naturu. Nenie lasu tian movadon fariĝi naciema kaj militista. Male ĝi devus instigi la junularon al paco kaj inter-kompreno de popoloj.

Tial utilas aparte la internaciaj tendaroj, kie skoltoj el diversaj landoj renkontiĝas kaj kunvivas en amikeco dum kelkaj semajnoj.

Tamen ĝis nun tiuj tendaroj ne realigis plenan interamikiĝon pro la lingva baro. Estis interrilatoj inter estroj, sed multaj grupoj, aŭ pli teknike « trupoj » restis aparte kaj ne povis funde konatiĝi kun fremduloj.

Ne temis pri tendaro, sed pli ĝuste pri aro da tendaroj apudaj. Nu Esperanto povas forigi tiun baron kaj komplete transformi la aferon farante el ĝi veran kunvenon internacian de diverslandaj geknaboj en familia rondo.

Tiam ili sentos la benon de paco, la valoron de amikecoj translimaj kaj abomenon al militoj inter popoloj. Unuan fojon eksperimento grandskala estos provata dum la nuna somero en Hungarujo. Internacia tendaro esperantista ricevis oficialan inviton. Ni devas ĉion fari por ĝin sukcesigi.

En nia lasta numero ni publikigis alvokon de S-o P. Balkanyi (Hajos-u. 15, Budapeŝto VI). Jam respondis esperantistaj skoltoj el Britujo kaj alvenos kvardekope. Se vi havas la eblecon, aŭ se via esperantista societo

loka, regiona aŭ nacia ĝin havas, helpu la vojaĝon de unu aŭ pluraj skoltoj el via lando por plimultigi la nombron da regnoj reprezentataj.

Venontan aŭtunon organizu kurson kun vojaĝa premio por skoltoj kaj, en somero 1932, la dua eksperimento fariĝu ankoraŭ pli grandioza en Ĉeĥoslovakio, de kie venas nova invito. En Krakovo ne forgesu interkonsiliĝi pri tio kun alilandaj esperantistoj.

Ne devus esti malfacile trovi ĵurnalon aŭ firmon pretan helpi tian entreprenon por fari al si reklamon inter legantoj. Por geknaboj lerni Esperanton estas ludo kaj tio havigas trafan okazon ekstudi kun difinita celo kaj certa okazo de tuja uzo.

La nuna kaj sekvonta jaro fariĝos gravaj en la historio de la homaro, ĉu per serioza paŝo antaŭen al senarmigo, ĉu per danĝerplena malsukceso kaj verŝajna ekscitiĝo de popoloj.

Ni posedas en manoj unu el plej potencaj iloj por ludi rolon utilan en tiu epoko. Ĉu ne estus krimo lasi tiun lampon sub la lito kaj ne fari ĉion eblan por ke la lingvo de Zamenhof helpu al eduko de la homoj kaj speciale de la junularo per propra sperto kaj rekta rimedo por interamikiĝado?

Ne lasu preterpasi la okazojn. La tempo gravas, la bezono urĝas kaj Esperanto taŭgas.

Edmond PRIVAT.

Socio kaj lingvo

Suahili, helplingvo de Orienta Afriko

De John Williamson, Dar-es-Salam.

La ideo de lingvo internacia ne estas nova. En ĉiuj epokoj de nia historio, la altrudo de la lingvo de pli forta potenco al malgranda lando proksima, pensigis la homojn pri tiu-ĉi sama ideo. Eble la plej bona ekzemplo estas la venko de la latina lingvo kiu influas la parolmanieron de la tuta Eŭropo, sed ankaŭ daŭre uzadis taŭgajn vortojn de la indiĝenaj lingvoj de landoj konkeritaj. La angla lingvo estas konata tra la komerca mondo kaj la britaj kolonioj; kaj estas la lingvo de Norda Ameriko; la hispana lingvo regas en Sud-Ameriko; ĉie oni komprenas la francan lingvon, kaj la germana estas potenca tra Orienta kaj Centra Eŭropo kaj en la landoj al kiuj Germanoj unue alportis la semojn de la civilizacio, instruante pri pli bonaj metodoj por gajni vivrimedojn per la terkulturigado.

Oni povus citi multajn tiajn ekzemplojn el la prahistorio kiuj, kvankam la motivo neniam, aŭ almenaŭ malofte estis pacema, tamen kunigis homojn diversnaciajn per komuna lingvo, tiel pretigante la vojon por la mirinda solvo de l'problemo de nia epoko.

Ĉirkaŭ la sesa jarcento post Kristo la Araboj ekstarigis koloniojn ĉe la orienta marbordo de la mistera Afriko. Jam de longe oni iris tien, ĉar la lando estis riĉa je oro, juveloj, eburo — kaj sklavo. Hodiaŭ oni povas vidi la misterajn ruinojn de Zimbabwe, granda urbo konstruita el ŝtono kiu staras en Rodezio, silenta atesto pri la kuraĝaj koloniistoj de forgesita epoko kiuj konstruis ĝin, kaj tie laboris, ludis, batalis, amis kaj mortis, postlasinte nur tiun ŝtonan atestajn kies misterojn neniu povas legi. Oni ne scias ĉu ĝi estis konstruita 1000 jarojn post Kristo, aŭ 2000 jarojn antaŭ Kristo!

Tamen la Araboj estis la unuaj pri kiuj ni scias certe ke ili venis grandnombre, ĉar estas iliaj posteuloj loĝantaj ĉe la Afrika marbordo de la Hinda Oceano. Ili trovis, ke la indiĝenoj havas tre multajn lingvojn, kaj kvankam ĉiuj de la Bantu-familio havas unu komunan bazon, ili diferencigas tre multe. Dum jarcentoj la triboj interbatalis ĝis ili forgesis, ke iam ili estis samlingvaj, kaj en apudaj vilaĝoj la dialektoj estas tute malsamaj. Do la Araboj ne povis kompreni sin al la negroj. Bedaŭrinde la ĉefaj metodoj de interkompreniĝo kiujn ili uzis estis la glavo, la vipo, kaj la sklavkateno, sed kvankam la akiro de sklavoj kaj eburo restis la ĉefa celo de la Araboj, kelkaj restadis en la marbordaj urboj kiel agentoj; aliaj starigis siajn negocojn tie, kaj sinsekve kolonioj fariĝis kaj fortikaĵoj konstruiĝis, kie antaŭe estis sovaĝejoj. Komprenable ili komencis edzinigi indiĝenajn virinojn kaj enporti aliajn en siajn domaranojn.

Tiuj virinoj ne estis samlingvaj, tial la infanoj kiuj naskiĝis devus paroli plurajn lingvojn por ke ili interkompreniĝu, kaj tiel ankaŭ devus fari la Araboj mem. Tiel evoluis nova lingvo uzbla de la Araboj kaj ĉiuj triboj. Ĝi baziĝis sur la lingvoj de la Bantu familio havante ties gramatikon kaj vortaron, sed ankaŭ la povon ĉerpi vortojn el la araba vortaro kiuj mankis en afrikaj idiomoj, por esprimi abstraktajn ideojn alportitajn de la Araboj.

La gramatiko estas vere mirinda, ĉar ĝi preskaŭ ne havas esceptojn; nomoj, adjektivoj, verboj ktp kondukas sin laŭregule, kvankam vera skriba lingvo ne ekzistis ĝis la 19a jarcento kiam la misiistoj esploris ĝin. Mi aludas al la Suahila lingvo, konata de la Kabo de Bona Espero ĝis Aden, kaj trans la kontinento ĝis la Okcidenta Marbordo. Ĉe la bordoj de la Persa Golfo kaj de Okcidenta Hindujo oni trovas adeptojn de ĉi tiu internacia lingvo, sed ĝia vera hejmo estas la insulo Zanzibaro kaj la proksimaj marbordoj de Kenjo kaj Tanganjiko, kie troviĝas la Suahiloj mem, t.e. la idoj de Arabaj prapatroj kaj Afrikaj patrinoj.

Pli poste la Persoj aldonis kelkajn vortojn, kaj la Portugaloj, Francoj kaj Hindoj helpis per la aldonado de multaj vortoj: nun la Suahiloj pruntas el la angla lingvo. La sekvanta tabelo montras la ŝanĝojn necesajn por ke tiaj vortoj estu en bona Suahila stilo:

| Esperanto | Suahila | Portugala | Franca | Angla | Araba |
|------------|---------|-----------|--------|-----------|--------|
| kesto | kasha | caixa | | | |
| kesteto | bweta | | boîte | | |
| aŭtomobilo | motokaa | | | motor-car | |
| vino | mvinyo | vinho | | | |
| jako | koti | | | coat | |
| justeco | haki | | | | haqq. |
| libro | kitab | | | | kitab. |
| vino | divai | | du vin | | |
| tablo | meza | mesa | | | |

Dume la vortaro kreskadas laŭ la bezonoj de la lingvo; komprenable Afrikanoj ne havas vorton por « flugmaŝino » tial li nomas ĝin « ndege ya Ulaya » t.e. « birdo de Eŭropo »!

La elparolo de la Suahila lingvo similas al tiu de Esperanto escepte la sekvantaj literoj:

S. ch = E. ĉ.; S. sh = E. ŝ.; S. y = E. j; S. j = E. ĝ.; S. ĝ = E. ŭ.; S. th = Angla th en « Think. »; S. dh = Angla th. en « then ».

Estas 8 klasoj de nomoj, kaj ne estas seksaj (genraj) diferencoj en tiuj nomoj.

Unua Klaso. En ĉi-tiu klaso troviĝas ĉiuj *vivaj estaĵoj*; tiuj nomoj havas prefikson « m » en singularo, kaj « wa » en pluralo: ekz. mtu = homo; watu = homoj. La adjektivo devas akordiĝi kun la nomo, kiun ĝi ĉiam sekvas, kaj ordinare havas saman prefikson.

Ekz., la radiko « -kubwa » havas signifon « grand' »; tiel « mtu mkubwa » = « granda homo » kaj « watu wakubwa » = « grandaj homoj ».

2a Klaso. Ĉi tiu klaso ankaŭ havas prefikson « m » en sing., sed « mi » en plur., kaj nomiĝas la « Arbo-klaso » ĉar ĉiuj arboj troviĝas en ĝi. Ekz. « mto » = « arbo »; « miti » = « arboj ». La radiko « -refu » = « long' », tiel « mti mrefu » = « longa (alta) arboj ». Se oni aldonas al la nomo de iu frukto la prefikson « m », fariĝas la fruktarto; « chungwa » = « oranĝo »; « mchungwa » = « oranĝarbo », au « oranĝujo ».

3a Klaso. havas komencliteron « n », kaj ne sangiĝas en pluralo. « nyumba » = « domo(j) ». La radiko « -zuri » havas signifon « bel' », tiel « nyumba nzuri » = « bela domo. ».

Malfeliĉe por ne-Suahilo, la « n » malaperas antaŭ ch, f, h, k, p, s, t, kaj farigas « m » antaŭ b, v, & w, sed tio ne ĝenas Afrikanon kiu ne povas prononci ĝin antaŭ tiuj literoj laŭregule. Fremdlingvaj vortoj troviĝas en ĉi tiu klaso en perfekta Suahila, sed multaj el tiuj troviĝas en 5a klaso en popola dialekto.

4a Klaso havas en ununombro prefikson « ki » kaj en plurnombro « vi ». (Se la radiko komencas per vokalo la prefiksoj estas « ch » kaj « vy »). « kitabu » « vitabu » = « libro(j) ». En ĉi tiu klaso troviĝas i.a. ĉiuj diminutivaj (Esp.-et). « mtoto » = « infano »; « kitoto » = « infaneto ». « nyumba » = « domoj »; « vyumba » = « ĉambroj » (t.e. malgrandaj domoj).

5a. Klaso ne havas difinitivan prefikson en ununombro. (krom se la radiko komencas per vokalo, tiam ĝi havas prefikson « j »; « j'ambo » = « afero », aŭ se ĝi estas unusilaba, la prefikso estas « ji »; « ji' cho » = « okulo »); la plur. prefikso estas « ma ». Fremdaj nomoj, titoloj ktp troviĝas en ĉi tiu klaso ankaŭ multaj aliaj fremdaj vortoj kiel « gazeti » = « gazeto ». Fruktojn ankaŭ ĝi entenas; « limao », « malimao » = « citrono(j) ». La adjektivo sekvas la kutiman regulon, kaj prefiksas « ma » en pluralo.

6a Klaso. havas en ununombro prefikson « u » (« w » antaŭ vokalo), kaj en plur. nombro la « u » malaperas, (sed « w » fariĝas « ny » antaŭ vokalo). I.a. ĉiuj abstraktaj vortoj troviĝas en 6a Klaso. « -zuri » = « bel' »; « uzuri » = « beleco ».

Kaj la abstraktaj vortoj formiĝas per la aldono de « u » al la radiko; ekz. « -zuri » = « bela »; tial « uzuri » = « beleco » « -refu » = « longa »; tial « urefu » = « longeco ». La vortoj kies radikoj komencas per vokalo kiel ekzemple « uso » « nyuso » = « vizaĝo(j) »; « uimbo » nyimbo » = « kanto(j) ».

7a Klaso havas nur unu vorton, « mahali » = « loko », kaj ĝia adjektiva prefikso estas « pa »; « mahali pakubwa » = « granda(j) loko(j) ».

8a Klaso konsistas el verbaj infinitivoj uzataj klei nomoj, kaj havas prefikson « ku » (kiel ĝin ankaŭ ĉiuj infinitivoj). Ekz. « kufa » = « morti »; « -baya » = « malbona »; « kufa kubaya » = « malbona morto ».

La vortoj « tiu » & « tiu ĉi » montrantaj direkton ankaŭ akordiĝas kun la nomo ekzemple :

| Klaso | Nomo | Tiu ĉi | Tiu | Tiuj ĉi | Tiuj |
|-------|--------------|--------|-------|---------|-------|
| 1. | mtu. | huyu. | yule. | hawa. | wale. |
| 2. | mti. | huu. | ule. | hii. | ile. |
| 3. | nyumba. | hii. | ile. | hizi. | zile. |
| 4. | kiti. (seĝo) | hiki. | kile. | hivi. | vile. |
| 5. | yai. (ovo) | hili. | lile. | haya. | yale. |
| 6. | uimbo. | huu. | ule. | hizi. | zile. |
| 7. | mahali | hapa. | pale. | hapa. | pale. |
| 8. | kufa. | huku. | kule. | huku. | kule. |

Oni vidas ke la unua litero de ĉiu « tiu ĉi » estas « h »: ke la fina silabo de ĉiu « tiu » estas « le »; kaj ke oni almetas la finan silabon de la « tiu ĉi » vorto al la « le » de la « tiu » vorto; ekz. hu-yu fariĝas yu-le, ktp.

La pronomoj estas:

| | | | | | |
|-------|-------|-------|-------|--------|------|
| mimi. | wewe. | yeye. | sisi. | ninyi. | wao. |
| mi | ci | li | ni | vi | ili |

Sed oni nur uzas tiujn emfaze: kutime oni uzas prefiksojn kiujn oni aldonas al la verbo: estas prefikso por ĉiu nom-klaso, kaj, en la la. klaso, por ĉiu persono, jenc:

Pronomo mi = prefikso ni-. Pronomo ci = prefikso u-. Pronomo li = Prefikso a-. Pronomo ni = prefikso tu-. Pronomo vi = prefikso m. pronomo ili = prefikso wa-.

Por la aliaj klasoj oni ankaŭ uzas prefikson, jenc:

Klaso. 1. 2. 3. 4. 5. 6. 7. 8. Sing.

| | | | | | | | |
|-------------|----|-----|-----|-----|-----|-----|-----|
| (vidusupre) | u. | i. | ki. | li. | u. | pa. | ku. |
| " | i. | zi. | vi. | ya. | zi. | pa. | ku. |

Plur.

La tempojn de la verboj on esprimas per infiksoj: jenc:

| | | | | |
|--------------|-------|-------|-----------|-------|
| nuna | tempo | havas | infikson | -na- |
| pasinta | " | " | " | -li- |
| perfekta | " | " | " | -me- |
| venonta | " | " | " | -ta- |
| kondiĉa modo | " | " | prefikson | -nge- |
| infinitiva | " | " | prefikson | -ku- |

Do la verboj konstruiĝas tiel (1) pronoma prefikso; (2) tempa infikso; (3) verba radiko; kaj la tuto formas unu vorton, jenc: la radiko « penda » = « am' »: mi amas = ni' na' penda = ninapenda. ci amis = u'li'penda = ulipenda. li(ŝi) estas aminta = a'me'penda = aependu. ni amus = tu'nge'penda = tungependa. vi(plur)amos = mtapenda; ili amus = wangependa. Aliaj formoj estas: mi estus aminta = ningalipenda. se; aŭ kiam ci amas, aŭ amos, = ukipenda. eĉ se li amas (-us, au-os) ajapopenda; ni amu = tupende: amu = penda: kaj vi amis = mka-penda. (2a Klaso) Mti u'li'anguka = la arbo falis (3a Klaso) ndizi zilianguka = la bananoj falis ktp. Tiuj ekzemploj montras la strukturon de la aktiva verbo; la pasiva formo estas tute simila krom ke ĝi havas « w » antaŭ la fina « a » de la verbo: « kupenda » = « ami »; « kupendwa » = « esti amata ». Nilipendwa = « mi estas amata, aŭ, mi estis amata ».

La signo de *neo* estas « h » krom en malmultaj okazoj. En la nuna tempo de la verbo la fina « a » fariĝas « i » kaj la suprecititaj pronomprefiksoj estas anstataŭigitaj per si, hu, ha, hatu, ham, kaj hawa: tiel la nea formo de la nuna formo estas (mi ne amas ktp) sipendi, lupendi, hapendi, hatupendi, hampendi, hawapendi, haupendi, haipendi, haki-pendi, halipendi, haupendi, hapapendi, hakupendi, ktp. En la pasinta tempo, oni aldonas la « h », kaj la infikson « -ku- », tiel oni dirus (mi ne falis ktp) sikuanguka, hu'ku'anguka, ktp, la unua persona pronomo sole ne havante « h ». La venonta tempo similas al la afirmativa, sed havas la neajn prefiksojn, sitapenda, hutapenda, hatapenda, ktp.

La akuzativon oni formas per infiksoj, kiuj estas samaj kiel la verbaj pronomaj prefiksoj (vid. sup) (vidi = ku'ona). Li vidis min' = a'li'ni'ona. Mi vid'os la domo'n = ni'ta'i'ona nyumba. Ni vid'as seĝo'n = tu'na'ki'ona kiti.

Oni uzas la samajn infiksojn por la dativa kazo: -Li montris ŝin al mi = a-li-ni-mw-onyesha = alinimwonyesha. (kuonyesha = montri).

Adverboj devenintaj de radikoj havas prefikson « vi »: la radiko « -zuri » havas signifon « bel' »: mzuri = bela (Kl. 1) uzuri = bel(ec)o, kaj vizuri = bele. Arabdevenaj adverboj ne ŝanĝas; mtu hodari = kuraĝa homo: watu hodari = kuraĝaj homoj (sen ia prefikso).

Per la aldono de la sufikso « na », verbo fariĝas reciproka: kupendana = 'ami unu la alian'. Ofte la prepozicion oni esprimas per ŝanĝo al la verbo: 'kuleta' = 'alporti'; 'kuletea' = 'alporti al (iu)'; 'kufa' = 'morti'; 'kufia' = 'morti pro (iu)'; La 'iga' formo de la verbo formiĝas per la

ŝango de la fina 'a' je 'sha' au 'za': ekz.: 'kuzidi' = 'kreski'; 'kuzidisha' = 'kreskigi'; 'kufanya' = 'fari'; kufanyiza = 'farigi'. Aliaj vortoj ankaŭ donas tian rezultaton: 'laini' = 'mola'; 'kulainisha' = 'moligi';

Jen skizo de lingvo kiu alportis la benojn de la edukado al homoj diversgentaj, kiuj alie ne povus havi eĉ librojn pro la multenombro de iliaj idiomoj. La Tanganjika Registaro jam starigis bonajn lernejojn kie la negroj ĝas utilaj anoj de sia lando, lernante la kutimajn instru-objektojn kaj ankaŭ utilajn metiojn. Ili havas librojn ĉiuspecajn en Suahila lingvo, inkluzive famajn anglajn romanojn de H. Rider Haggard, kaj R. L. Stevenson, fabelojn de Rudyard Kipling ktp. Ankaŭ libroj pri terkulturado, higieno, simpla fiemo, krom legolibroj kaj interesajoj verkitaj de la nelacigeblaj misiistoj trovas lokon sur la bretoj de homoj kies patroj estis sovaĝuloj, kies porteblaj posedaĵoj eble sumiĝis en pafarko, sagoj kaj tranĉilo.

Ekzemplo de la lingvo :

Kwa maana jinsi hii Mungu aliupenda ulimwengu, haita akampeleka Mwana wake wa pekee, illi mtu aliye yote amwaminiye asipotee, bali apate uzima wa milele.

Supra teksto laŭ la dialekto parolata en Zanzibaro, respondas al la parto el Sankta Johano 3. 16, nome :

Ĉar Dio tiel amis la mondon, ke li donis sian solenaskitan Filon, por ke ĉiu, kiu kredas je li, ne pereu sed havu eternan vivon.

7-a Somera Universitato en Esperanto

Krakovo, 1-8 Aŭg. 1931

Rektoro :

Dro. Jerzy Loth, Profesoro de l'Universitato de Varsovio.

Vicerektoroj :

D-ro Stanislaw Nowakowski, Profesoro de l'Universitato de Poznan. [Genevo.

D-ro Edm. Privat, Priv. Docento ĉe la Universitato de

PROGRAMO DE LA PRELEGOJ

Ĝenerala temo: *TURISMO*

Inĝeniero D-ro K. H. Friedman, Dresdeno :

Danĝeroj de Alpa montmigrado.

D-ro Walery Goetala, Profesoro de geologio de l'Jagellona Universitato en Krakovo :

Naciaj Parĥoj kaj konservado de l'natur.

D-ro Aug. Pitlik, Supera Komisarano en la Ĉeĥoslovaka Ministerio de Turismo: *Metodoj de sukcesa turisma informado kaj gvidado al eksterlandanoj.*

D-ro. Wlad. Szafer, Profesoro de Botaniko de la Jagellona Universitato kaj delegito de la Ministerio de popola klerigado :

Naciaj Parĥoj por konservado de l'natur.

D-ro. Viktor Wilkosz, Profesoro de Matematiko de l'Jagellona Universitato en Krakovo :

Signifo de l'turismo por la mensa evoluo.



Gajaj horoj por Esperantistoj

56 paĝa libro por gajigi grupvesperojn-instrukcionojn

elektitaj spritaĵoj, bonhumoraj anekdotoj, enigmaj ŝercdemandoj, gajaj preseraroj, esperantaj vortludoj.

Kun afranko RM 0.55 aŭ 2 respondkuponoj riceveblaj en ĉiu poŝtejo.

C. WALTER, BERLIN W. 10, Hohenzollernstr. 11 (Germ.)

Poŝtĉeko: Berlin 85766

Tekniko

Per nova akustiko al nova muziko

De A. Läufer, Mainz.

La nova akustiko estas la elektra akustiko. Ni dankas ĝin al la evoluo de la senfadena telefonio. La ĝisnuna muziko uzas la osciladon de elastaj korpoj. La elektra akustiko uzas la osciladon de la jonoj en la trielektroda lampo. La instiganto de la sono estas la alternfluo. La sono en la vakua tubo devenas do de preskaŭ senmateria oscilado. Tial ĝi estas tre varikapbla kaj sentema ĉiurilate, laŭ forto, laŭ alto, laŭ koloro. Ĉi tiu variado estas preskaŭ senmezura; ĉiel ĝi atingas la limojn de aŭdebleco.

Ĉiu kiu aŭskultas radion kaj uzas turneblan kondensatoron scias ion pri reakcia kuplado kaj jam aŭdis la akrajn sonojn, kiuj ĝenas najbarajn aŭskultantojn. La trielektroda lampo fariĝas generatoro kaj eligas la sonojn. Per simpla turno, oni facile povas aŭdigi seninterrompan vicon de sonoj, tra pluraj oktavo. Jen la principo laŭ kiu Jörg Mager en Darmstadt konstruas novajn orgenojn. La elektra orgeno bezonas nek lignon nek metalon por fajfiloj. Tio estas granda ŝparo je materialo kaj spaco. Oni nur pripensu ke granda orgeno bezonas grandan nombron da fajfiloj kun 13,50 metroj da longeco.

Sistemo de kondensatoroj ebligas dividi la intervalon de unu sono en 1/200. Sed pro troa komplikeco de la instrumento, oni ne uzas tiun eblecon. Oni eble uzos 1/2 kaj 1/3 kaj 1/4 sonojn. La uzataj kondensatoroj estas blok-kondensatoroj. Ili havas prisman formon kaj per enskribo montras la nombron de mikrofaradoj. Ili variigas la alton de la sonoj.

Sistemo de reostatatoj variigas la forton de l'elektra fluo kaj per tio la forton de la sono. Tiu variado ampleksas ĉiujn gradojn de la tondra sono tremiganta la fenestrojn ĝis la sono aŭdebla nur en silenta nokto.

Preskaŭ ĉiu muzikinstrumento estas unukolora. La elektra orgeno de Mager havas grandan facilecon kaj preskaŭ senliman eblecon kunmeti kaj miksi la plej diversajn sonkolorojn, li uzas sonskribilon kaj sonfiltron. Profesoro Wagner konstruis tiujn aparatojn. Al ili la elektra orgeno dankas ĝian sentinan varieblecon. Sub la influo de Wagner, Jörg Mager konstruis 1922 sian sferofonon. Hodiaŭ li jam ludas orgenon, kiu igas atenti la fabrikantojn de orgenoj. Profesoro de muziko-scienca D-ro Sachs en Berlin diras pri la sferofono :

« Niaj ĝisnunaj sonkoloroj estas tre malgranda eltranĉo el la senfinco de la eblaj sonkoloroj. »

La elementoj por tiu sonkoloriga influigo estas membranoj kun elektromagnetaj instigiloj ligataj kun ĉiuspecaj resonatoroj : Vitro, ligno, ladoj el ĉiuspecaj metaloj kaj alojoj. Resume : Per analizo kaj sintezo de la sono oni povas forigi aŭ aldoni suprajn sonojn laŭvole per filtroj kaj resonatoroj.

La mikro-intervaloj nepre ŝokos la ĝisnunajn muzikverkistojn, la tradiciemajn konservativajn muzikistojn. Ili kontraŭbatalos la kvaron-kaj seson-sonon. Sed ĝuste la estonta homo kaptos tiun ideon. La « Omni toniam » la revo de la mezepoko efektiviĝos.

Jörg Mager jam laboras praktike. Li jam konstruas uzablajn instrumentojn. Temas recipe pri instrumentoj por koncertejoj, preĝejoj kaj flmteatro.

Literaturo

Der Weg zurück

De Erich Maria Remarque

La Vojo returne... tiel titoliĝas la sekvo al la romano « En Okcidento nenio nova » plej disvastigita libro postmilita. Remarque priskribas en tiu ĉi nova verko la revenon de la batalintoj al la hejmo, la animan konflikton kreitan el la kontrasto de preskaŭ forgesitaj moralaj perceptoj kaj la realaĵoj de l'fronta spertado. La milito ne nur detruis vivojn sed ankaŭ animojn.

Kiel la unua verko ankaŭ tiu ĉi aperas en Esperanto. La raĵon akiris la eldonejo de Heroldo de Esperanto en Köln. La tradukon prizorgis S-ro Jofebo. Ni prezentas al nia legantaro la unuan ĉapitron. La libro mem aperos post nelonge.

La ŝoseoj etendiĝas longe tra la pejzaĝo, la vilaĝoj kuŝas en griza lumo, la arboj susuras kaj la folioj falas, faladas.

Sur la ŝoseoj moviĝas, paŝon post paŝo, la grizaj homkolonoj en siaj paliĝintaj, malpuraj uniformoj. La barbotopaj vizaĝoj sub la ŝtorkaskoj estas mallarĝaj kaj kavigitaj de malsato kaj mizero, elfositaj kaj kunfanditaj je tiuj linioj, kiujn gravuras teruro, braveco kaj morto. Silente ili antaŭenigadas, same kiel ili marŝadis jam laŭ tiom da ŝoseoj, sidadis en fervojaj ŝarĝvagonoj, kaŭradis en tiom da frontaj ŝirmejoj, kuŝadis en tiom da grenadtuneloj — sen multaj paroloj; tiel ili marŝadas ankaŭ nun laŭ ĉi tiu ŝoseo en la hejmon kaj en la pacon. Sen multaj paroloj.

Maljunaj homoj kun barboj, kaj mallarĝaj, ankoraŭ ne dudekjaraj kamaradoj, sen diferenco. Apud ili iliaj leŭtenantoj, junuloj-infanoj, sed gvidintoj en multaj noktoj kaj atakoj. Kaj post ili la armeo de la mortintoj. Tiel ili marŝadas antaŭen, paŝon post paŝo, malsanaj, duonmortintaj pro malsato, sen municio, en malmultnombraj kompanioj, kun okuloj ankoraŭ ne kapablaj kompreni tion: esti foriĝintaj el la Hadeso — esti sur la vojo returne al la Vivo.

I.

La kompanio marŝas malrapide, ĉar ni estas lacaj kaj krome kunportas vunditojn. Pro tio nia grupo iom post iom postrestas. La pejzaĝo estas monteta, kaj kiam la ŝoseo maldekklivas, ni povas vidi de sur la altaĵo je unu flanko la reston de niaj formaŝantaj trupoj kaj je la alia la densajn, senfinajn homliniojn kiuj nin sekvas. Estas amerikanoj. Kvazaŭ larĝa rivero iliaj kolonoj ŝoviĝas antaŭen inter la arbovicoj, kaj super ili treme kuras la moviĝema briletado de l'armiloj. Sed vaste ĉirkaŭe kuŝas la trankvilaj kampoj, kaj la suproj de l'arboj serioze kaj senrilate elstaras per siaj aŭtunaj koloroj el la alŝoviĝanta fluego.

Ni kampadis dum la nokto en malgranda vilaĝo. Malantaŭ la domoj, en kiuj ni kuŝis, fluas rivereto borderita de salikoj. Mallarĝa vojeto kondukas laŭ ĝia bordo. Unuope, en longa vico ni laŭiras ĝin. Kosole estas la unua.

Apud li kuras Wolf, la kompania hundo, kaj flaras je lia pansako.

Subite tie, kie la vojeto kuniĝas kun la ĉefvojo, Ferdinand returnsaltas.

« Atenton ! »

En la tujposta momento ni, kun suprenlevitaj fusiloj, fulmrapide disiĝas. Kosole kuŝas en la ŝosea foso, preta por ekpaŝi, Jupp kaj Trosske klinkaŝiĝas spione malantaŭ sambuk-arbusto, Willy Homeyer ektiras je sia ledozono kun mangrenadoj, kaj eĉ niaj vunditoj estas batalpretaj.

Laŭlonge de la ŝoseo venas amerikanoj. Ili ridas kaj interbabilas. Tio estas la antaŭgvardio, kiu nin atingis.

Adolf Bethke kiel sola inter ni restis staranta. Li nun faras kelkajn paŝojn el la ŝirmloko, sur la straton. Kosole ree leviĝas. Ankaŭ ni aliaj pripensas la situacion, konfuze kaj embarase ordigante niajn zonaĵojn kaj niajn fusilrimenojn — de kelkaj tagoj oni ja ne plu batalas.

La amerikanoj surprizite ekhaltas, ekvidante nin. Ilia interparolado ĉesas. Malrapide ili alproksimiĝas. Ni retiras nin direkte al remizo, por esti dorse ŝirmitaj, kaj observe atendas. La vunditojn ni prenas en la mezon.

Post unu minuto da silento arbo-alta amerikano eliĝas el la grupo antaŭ ni, farante mansignon.

« He, kamarado ! »

Adolf Bethke same levas la manon. « Kamarado ! »

La situacio malstreĉiĝas. La amerikanoj alproksimiĝas. Post unu momento ni estas ĉirkaŭitaj de ili. Tiel proksime ni vidis ilin ĝis nun nur tiam, kiam ili estis kaptitaj aŭ mortintaj.

Estas stranga momento. Silente ni alrigardas ilin. Ili staras en duoncirklo ĉirkaŭ ni, ĉiuj grandaj, fortikaj homoj, ĉe kies aspekto oni tuj konstatas, ke ili ĉiam havis sufiĉe por manĝi. Ĉiuj estas junaj — neniu el ili estas eĉ proksimume tiel aĝa kiel Adolf Bethke aŭ Ferdinand Kosole — kaj ili ambaŭ vere ja ne estas niaj plej maljunaj. Sed ankaŭ neniu el ili estas tiel juna kiel Albert Trosske aŭ Karl Bröger — kaj ili eĉ ankoraŭ ne estas niaj plej junaj.

Ili portas novajn uniformojn kaj novajn mantelojn; iliaj botoj estas nepenetrebaj por akvo kaj ĝustformaj; iliaj armiloj estas bonaj kaj iliaj poŝoj plenaj de municio. Ĉiuj estas freŝaj kaj ne eluzitaj.

Kompare kun tiuj homoj ni estas nepre nur ŝtelista bando. Niaj uniformoj estas senkolorigitaj de la koto de l'jaroj, de la pluvo de l'Argonoj, de la kalko de l'Ĉampanjo, de la marĉakvo en Flandrujo; — la manteloj disĉifonitaj de grenadsplitoj kaj ŝrapneloj, flikitaj per grandaj kudretoj, rigidaj pro argilo kaj kelkfoje pro sango; — la botoj uzaciĝitaj, la armiloj malpreciziĝintaj, la municio preskaŭ for; — ni ĉiuj estas egale malpuraj, egale sovaĝiĝintaj, egale lacaj. La milito kvazaŭ vaporprenilo transrulis nin.

Pli kaj pli da trupoj alvenas. La placo estas nun plena de scivoluloj.

Ni staras ankoraŭ en la angulo, kunpremitaj ĉirkaŭ niaj vunditoj, — ne pro tio ke ni timas, sed ĉar ni apartenas unu al la aliaj. La amerikanoj puŝetas sin reciproke, signante niajn malnovajn eluzitajn objektojn. Unu proponas

al Breyer pecon da blanka pano, sed tiu ne akceptas ĝin, kvankam el liaj okuloj rigardas la malsato.

Subite iu kun subpremita ekkrio gestas al la bandaĝoj de niaj vunditoj. Ili konsistas el krispa papero kaj estas liksitaj per ŝnurfadenoj. Ĉiuj alrigardas ; — poste ili paŝas returne kaj interflustradas. Iliaj afablaj vizaĝoj fariĝas kompatemaj, ĉar ili vidas, ke ni eĉ muslinajn bandaĝojn jam ne havas.

La viro, kiu antaŭe alvokis nin, metas la manon sur la ŝultron de Bethke. « Germano — bona soldato », li diras, « brava soldato — »

La ceteraj fervore kapsignas.

Ni ne respondas, ĉar nun ni ne estas kapablaj respondi. La lastaj semajnoj treege suferigis nin. Ree kaj ree ni devis antaŭeniri en la kanonadon kaj perdis homojn sen ia neceso ; sed ni ne demandis multe ; ni simple agis kiel ni agis dum la tuta tempo, kaj je la fino nia kompanio havis ankoraŭ tridek-du virojn el ducent. Tiel ni elvenis, ne pripensante plu, sentante nur, ke ni faris bone tion, kion oni komisiis al ni.

Sed nun, sub la kompatemaj okuloj de l'amerikanoj ni ekkomprenas, kiel sensenca estis ĉi ĉio ankoraŭ ĉe la fino. La aspekto de iliaj senfinaj, riĉe provizitaj kolonoj montras al ni, kontraŭ kia senesperiga plipotenco de homoj kaj materialo ni rezistadis.

Ni mordas niajn lipojn nin rigardante. Bethke fortiras sian ŝultron sub la mano de l'amerikano, Kosole fiksrigardis antaŭ sin, Ludwig Breyer rektigas sin — ni tenas pli forte niajn fusilojn, niaj ostecaj membroj streĉiĝas, la okuloj malmoliĝas kaj ne rigardas malsupren, ni denove vidas en la pejzaĝon, el kiu ni venis, niaj vizaĝoj fariĝas rigidaj pro emocio, kaj varmege travibras nin ankoraŭ unufoje : ĉio kion ni faris, ĉio kion ni suferis, kaj ĉio kion ni lasis malantaŭe.

Ni ne scias, kio okazas al ni ; sed se nun akra parolo allflugus, ĝi tute streĉus nin, vole-nevole, ni ĵetus nin antaŭen ekfuriozante, sovaĝe kaj senspire, freneze kaj perдите, kaj ni batalus — malgraŭ ĉio batalus denove —

Fortlikstatura serĝento kun ekscite-arda vizaĝo ŝovas sin direkte al ni. Super Kosole'n, kiu staras plejproksime de li, li ŝprucigas abundon da germanaj vortoj. Ferdinand ekskuigis, tiom li estas surprizata.

« Tiu parolas ja ekzakte kiel ni », kun miro li diras al Bethke, « kion vi diras nun ? »

La viro parolas eĉ pli bone kaj pli flue ol Kosole. Li rakontas, ke antaŭ la milito li estis en Dresdono kaj tie havas multajn amikojn.

« En Dresdono ? » demandas Kosole pli kaj pli mirigite, « tie ankaŭ mi ja estis du jarojn — »

La serĝento ekridetas, kvazaŭ tio estus honorigo. Li nomas la straton, en kiu li loĝis.

« Eĉ ne kvin minutojn distance de mi », nun Ferdinand klarigas ekscite, « mirige ke ni ne vidis nin ! Ĉu vi eble konas la vidvinon Pohl, ĉe angulo de Johenstrateto ? Dikulinon kun nigraj haroj ? Mia mastrino ! »

La serĝento ne konas ŝin ; li si flanko konas la kalkul-konsiliston Zander, pri kiu Kosole ne povas memori. Sed ambaŭ memoras pri la Elbo kaj la Kastelo kaj gajradie rigardas sin reciproke, kvazaŭ ili estus malnovaj amikoj. Ferdinand frapas sur la supran brakon de l' serĝento : « Homo, homo — babilas germane kiel spertulo kaj estis en Dresdono ! Homo, pro kio envere ni ambaŭ intermilitadis ? »

La serĝento ridas kaj ankaŭ ne scias. Li eltiras paketon da cigaredoj kaj prezentas ĝin al Kosole. Tiu rapide ekkomprenas, ĉar por bona cigaredo ĉiu el ni volonte donus

pecon de sia animo. Niaj propraj konsistas nur el fag-folioj kaj fojno, kaj tio estas eĉ la pli bona speco. Valentin Laher asertas, ke la ordinaraj konsistas el zostero kaj sekigita ĉevalsterko, — kaj Valentin estas fakulo.

Kosole plengue forblovas la fumon. Ni avide flaradas. Laher paliĝas. Liaj nazvandoj vibradas. « Donu foje unu fumtiron », li petege diras al Ferdinand. Sed antaŭ ol li povas ekpreni la cigaredon, alia amerikano presente tenas al li paketon da virginia tabako. Nekredeme Valentin alrigardas lin. Poste li ĝin prenas kaj ekflaras je ĝi. Lia vizaĝo radias. Hezite li redonas la tabakon. Sed la alia proteste malakceptas kaj forte signas la kokardon sur la soldata ĉapo de Laher, kiu iom eliĝas el la pansako.

Valentin ne komprenas lin. « Li deziras interŝanĝi la tabakon kontraŭ la kokardo », klarigas la serĝento el Dresdono. Tion Laher eĉ malpli komprenas. Ĉi tiun unuakvilitan tabakon kontraŭ lada kokardo — la viro certe estas freneza. Valentin ne eldonas la paketon, eĉ ne, se li tuj sur la loko povus avanci je suboficiro aŭ leŭtenanto. Li proponas al la alia tuj la tutan ĉapon kaj per tremantaj fingroj avide ŝtopas la unuan pipon.

Ni nun komprenis la signifon de la okazo : la amerikanoj deziras interŝanĝi. Oni rimarkas, ke ili ankoraŭ nelonge estas en la milito ; ili ankoraŭ kolektas rememoraĵojn, epoletojn, kokardojn, zombukojn, ordenojn, uniformbutonojn. Ni, niaflanke, provizas nin per sapo, cigaredoj, ĉokolado kaj konservajoj. Por nia hundo ili volas doni al ni krome eĉ tutan manplendon da mono ; — sed ili ofertu kiom ajn Wolf restos ĉe ni.

Ankaŭ rilate al niaj vunditoj ni estas bonŝancaj. Amerikano kun tiom da oro en la buŝo, ke la buŝaĉo brilas kiel latunlaborejo, deziras havi bandaĝofonon kun algluiĝinta sango, por ke li povu pruvi hejme, ke ili efektive estis el papero. Li proponas unuakvilitan kekson kaj antaŭ ĉio brakplenon da bandaĝmaterialo. Zorgeme kaj tre kontente li gardas la ĉifonojn en sian leterujon, precipe tiujn de Ludwig Breyer ; ĉar tio estas leŭtenanta sango. Ludwig devis surskribi per kraĵono lokon, nomon kaj regimenton, por ke ĉiu en Ameriko tuj povu vidi, ke la afero ne estas ia trompo. Unue li ja ne volis ; sed Weil persvadis lin, ĉar ni urĝe bezonegas la bonan bandaĝmaterialon. Krome la kekso estas vera savo por Breyer kun lia disenterio.

Sed la plejbonan ŝancon trafas Arthur Ledderhose. Li altrenas keston kun « feraj krucoj », kiun li trovis en forlasita oficejo. Amerikano same sulktraĵta kiel li, kun sama citrona vizaĝo, volas akiri la tutan keston pogrande. Sed Ledderhose nur rigardas lin per longa, supera rigardo el kunpremitaj okuloj. La amerikano eltenas la rigardon same senmove kaj laŭŝajne senmalice. Ambaŭ subite sin similas kiel fratoj. Super milito kaj morto ĉi tie rekontiĝas io, kio transdaŭris ĉion : la negoca spirito.

La kontraŭulo de Ledderhose baldaŭ rimarkas, ke li ĉi tie ne havas ŝancon por negoci, ĉar Arthur ne estas trompebla : pomalgrande lia komercado estas ege pli profitodona. Li interŝanĝadas, ĝis kiam la kesto estas malplena. Apud li kolektiĝas iom post iom amaso da aĵoj, eĉ butero, silko, ovoĵoj kaj tolajo, tiel ke li fine staras kiel konsumbutiko sur O-gamboj.

Ni ekformarŝas. La amerikanoj vokas kaj gestas post nin. Precipe la serĝento el Dresdono estas nelacigema. Ankaŭ Kosole estas emociita, en tia grado kia estas ebla ĉe malnova soldato. Li gruntas kelkajn adiaŭajn sonojn mansignantemaj ; sed tio aspektas ĉe li ankoraŭ samtiel, kvazaŭ li minacus. Poste li diras al Bethke : « Tute prudentaj uloj, ĉu ne ? »

Adolf kapjesas. Silente ni daŭrigas nian vojon. Ferdinand malrektigas la kapon. Li estas pensanta. Ne ofte li faras tion, sed kiam io venis en lian kapon, tiam li estas obstina kaj pense maĉas ĝin dum longa tempo. Li ne povas malmemori la serĝenton el Dresdenu.

El la vilaĝoj la homoj fiksrigardas nin de malantaŭe. En dometo de fervoja gardisto floroj staras ĉe la fenestro. Virino kun plenaj mamoj suĉigas infanon. Ŝi portas bluan veston. Hundoj bojadas post nin. Wolf boje respondas. Apud la vojo koko saltas sur kokinon. Ni fumadas senpense.

..

Marŝadi, marŝadi. La zono de la frontlazaretoj. La zono de la provizoficejoj. Granda parko kun platanoj. Sub la arboj brankardoj kaj vunditoj. Falas la folioj kovrante ilin per ruĝo kaj oro.

Gaslazareto. Gravaj malsanuloj ne plu transporteblaj. Bluaj, vaksecaj, verdaj vizaĝoj, mortecaj okuloj, dismorditaj de la acidaĵo, stertorantaj, baraktantaj mortantoj. Ĉiuj volas foriĝi, ĉar ili timas la kaptiĝon. Kvazaŭ ne estus tutegale, kie morti.

Ni provas ilin konsoli, dirante ke ĉe la amerikanoj ili estos pli bone flegataj. Sed ili ne aŭskultas. Denove kaj denove ili vokas al ni, ke ni bonvolu ilin kunporti.

La vokado estas terura. La palaj vizaĝoj aspektas tiel nerealtaj en la klara aero ĉi tie ekstere. Sed plej malbone statas la afero pri la barboj. Ili strange staras hirtaj, malmolaj obstinaj, parazitaj ĉirkaŭ la kadukiĝintaj makzeloj, kvazaŭ nigra ŝimtavolo kiu nutriĝas des pli, ju pli la homoj konsumiĝas.

Kelkaj el la grave-vunditoj etendas siajn maldikajn, grizajn brakojn kiel infanoj. « Bonvolu kunporti min, kamaradoj », ili kvazaŭ almozpetas, « kunportu min, kamaradoj ! »

En iliaj okulokavoj kaŭras jam profundaj, fremdaj ombroj, el kiuj pene eliĝas la okulgloboj jam nur kiel dronantoj. Aliaj estas silentaj ; ili sekvas nin nur per la rigardoj tiom malproksimen kiom eble.

Iom post iom la kriado malfortiĝas. Malrapide preteriĝas la ŝoseoj. Ni ŝarĝeportas multajn objektojn, ĉar ion oni ja devas kunporti hejmen. Nuboj pendas je la ĉielo. Posttagmeze traboras ilin la suno, kaj betuloj, kun nur malmultaj folioj, respeguliĝas en la pluvomarĉetoj de l'vojo. Facila, blua vaporeto ŝvebas inter la branĉoj.

Dum mi marŝas, kun la tornistro surdorse, kun kapo klinita, mi vidas ĉe la ŝose-rando, en la klaraj pluvmarĉetoj, la bildon de la helaj, silkecaj arboj, kaj ĝi estas pli forta en ĉi tiu hazarda spegulo ol en realeco. Enmetite en la bruna grundo ĉi tie kuŝas peco da ĉielo, arboj, profundeco kaj klareco, kaj subite mi froste ektemas. La unuan fojon post longa tempo mi ree eksentas, ke io estas bela, ke ĉi tio estas simple bela, bela kaj pura, ĉi tiu bildo en la akvomarĉeto antaŭ mi... kaj en tiu ektrernado leviĝas mia koro alten, ĉio forfalas de mi dum unu momento, kaj nun mi konscias unufoje : paco —, vidas : paco —, elsentas ĝin plene : paco. Foriĝas la premo nemion lasinta libera ĝis nun, io nekonata, io nova ekflugas, mevo, blanka mevo. Paco, tremanta horizonto, tremanta atendo, unua ekriĝo, antaŭsento, espero, io ŝveliganta, venanta : paco.

Mi subite ekskuigiĝas kaj rigardas post min ; tie malantaŭe kuŝas nun miaj kamaradoj sur la brankardoj kaj ankoraŭ kriadas. Estas paco, kaj malgraŭ tio ili devas morti. Sed mi vibras pro ĝojo kaj ne hontas. Stranga estas tio —

Eble nur pro tio ekestas milito ĉiam denove kaj denove, ke iu neniam kapablas tute elsendi tion, kion suferas alia.

La homo kaj la maro

De Charles Baudelaire.

*Libera homo, estos al vi eterne ĥara
La mar'! Animon vian ja kvazaŭ en spegulo
Admiras vi en ĝia senfina ondo-rulo,
Via spirital' ne estas profund' malpli amara.*

*En via spegubildo vi mergas vin ĥun ĝuo,
Ĝin ĉirkaŭbraĥas braĥe, okule; ĥoro via
Sin savas ĥelĥafoge de l' propra voĉo ĥria
Per tiu nebrideble sovaĝa plendo-bruo.*

*Vi ambaŭ estas same mallumaj ĥaj ĥaŝemaj.
Hom'! Kiu sondis fundon de la abism' anima?
Mar'! Kiu povas scii pri via riĉ' intima?
Tiel ĵaluze gardas vi pri l' sekretoj memaj.*

*Kaj tamen dum centjaroj sennombraj, vi per batoj
Kruelaj interluĥtas ĥun senĥompata forto,
Tiel amataj estas de vi la murd' ĥaj morto,
Eternaj batalantoj, vi senindulgaj fratoj!*

Babilo

De Charles Baudelaire.

*Aŭtun-ĉiel' vi estas, helroza ĥaj serena,
Min maro de malĝojo inundas en anim',
Kaj lasas, refluinte, sur mia lipo splena
La mordan rememoron de la amara ŝlim'.*

*La mano vane glitas tra mia svena sino,
Ŝiritan vundon trovos vi tie, amik'in',
Ĝin ŝiris ungoj, dentoj sovaĝaj de l' virino,
Ne serĉu mian ĥoron, la bestoj manĝis ĝin.*

*La bruston, ĉi palacon, infeĥtis hordo ĥruda,
Oni orgias, murdas, ĥverelas tie ĉi,
Parfumo ĉirĥaŭnaĝas ĉe via gorĝo nuda.*

*Ho Belo! Dura vipo de l' ĥoroj! Volas vi.
Per viaj fajr-okuloj, brilantaj, kvazaŭ festoj,
Cindrigu la ŝiraĵojn, lasitajn de la bestoj!*

El la franca: K. Kalocsay.

Plej bone

De GOETHE.

*Se ĥapo vin ĥaj ĥoro pelas,
Plej bone estas por la hom'
Se neĥ vi amas, neĥ malcelas,
Vi taŭgas nur por morta dom'.*

*Mano nur man' sin lavas;
Anĥaŭ donu, se vi prenas.*

Trad. Franz DÖRING.

HEROLDO DE ESPERANTO
Rapida novaĵportanto

Socia Vivo

Aero, suno kaj akvo

Urba vivado lacigas homojn kaj ilin malsanigas. Troa bruado, troa mallumo, troa urĝado malfortigas nervojn kaj animo suferas pro premado de la korpo.

La moderna junularo ne intencas lasi mortigi sin. Ĝi reagas, ĝi emas al liberigo de korpo kaj animo. Tial la granda sukceso de sporto. Tial la ekskursado, kun sako sur dorso kaj bastono en mano.

Antaŭ iom da tempo iu pastro plendis en Anglujo, ke la ĝejnuloj nun foriras tutan dimanĉon kune, ofte nur duope. Kaj anglaj knabinoj, por pilgrimi, nun vestas sin per mallonga pantaloneto sporta. Kial ne? Alia religiulo feliĉe defendis ilin kaj montris la plibonecon de tiu saniga ekzercado kaj interkonatiĝado. Ĝi ja estas centfoje pli morala ol dancado kaj koketado en mondanaj baloj. Pripensu tion.

Kuna kontakto kun naturo, aero, suno, pejzaĝo, marŝado, jen bonegaj aferoj. Ankaŭ interparolo pri fundamentaj temoj anstataŭ bagatelaj komplimentajoj.

Reago kontraŭ danĝeroj de urba vivado ankaŭ esprimiĝas per ŝanĝo de la nutra kutimo. Antaŭ la mondo-milito manĝo de viando ŝajnis esti dogmo kaj idealo. Hodiaŭ la junularo serĉas pli sanigan manĝaĵon, interesiĝas pri grenoj, fruktoj, verdajoj. Ankorau malmulto estas absolute vegetarana, sed la amaso forlasas viandon ĉiujare pli kaj pli. Vidu la statistikojn de buĉado. En novaj hejmoj la viando malaperas de vespermanĝoj.

Simile kreskas la ŝato al sunbanado kaj naĝado. Ĉie stariĝas novaj banejoj. Dimanĉo dum somero la popolo migras al maro, lagoj aŭ riveroj kaj pasigas la tagon inter akvo kaj suno. Plezure oni forlasas la pezajn urbajn vestojn.

Inter la riĉuloj la mondana modo postkuras eĉ al tiuj rifuĝejoj naturemaj. En luksaj banejoj oni vidas tiujn malspritaĵajn pantalonegojn kaj silkajn pijama-kostumojn « por la marbordo ». La mondana koketado batalas kun la natura suno. Tio feliĉe ne okazas ĉe popolaj banejoj de la junularo, kie regas jam tro da sportemo kaj ŝato al suno.

Kontraŭ tiuj malsaĝaj manieroj ankaŭ defendas sin tiuj nacioj jam de longe kutimiĝintaj je banado, ĉar ili posedas multajn lagojn aŭ marbordojn, ekzemple Japanoj, Finnoj, Skandinavo.

En ties landoj oni scias jam de longe la plezuron kaj utilecon profiti la naturan akvon kaj sunon por purigi kaj sanigi la korpon kaj animon. Tie, for de la mondanaj lokoj, la homoj libere banas sen iuj vestoj kaj sentas neniun ĝenon pri tio.

Male, ili sentas honton pri tiuj, kiuj kaŝas sin aŭ koketadas per bankostumoj. En Finnlando la familioj ja kutimas je kunaj vaporbanoj dum tuta jaro.

En tiuj skandinavaj landoj, kie la ĝejnuloj ne hontas pri sia korpo, sed ŝatas purecon entutan, oni respektas virinojn multe pli ol en ceteraj landoj. Tie ili voĉdonas jam de longe kaj ludas rolon en la nacia publika vivado. Tie prostitucio kaj pornografio mankas sur stratoj aŭ aŝioj. La sankteco de la hejmo profitas el la natureco kaj libereco de la honestaj moroj.

Ceteraj popoloj admiras tiun superan gradon de civilizo, kiam ili per vojaĝado kaj observado rimarkas ĝin. En Germanujo kaj Francujo lastatempe disvastiĝis granda movado por faciligi liberan ekzercadon kaj banadon sen kostumoj kun celo de pureco, saneco kaj respekto inter seksoj.

Popolaj asocioj formiĝis. Ili aĉetis aŭ luis fermitajn parkojn aŭ insulojn kaj tien venas familioj por pasigi la dimanĉojn aŭ

sabatojn posttagmeze je sporto, gimnastiko, banado je suno kaj akvo. Tagmeze sub arboj la patrinoj manĝigas siajn infanojn ĉirkaŭ ligna fajro, same kiel afrikaninoj. Multa ĝojo regas. Samtempe la infanoj estas edukataj en plena liberigo el tiuj sekretaj scivolemoj, kiuj venenas tiom da vivoj kaj endanĝerigas ilian estontecon.

Kompreneble la publiko de nekutimantaj nacioj iom ridis komence. Tiuj viroj, kiuj ne kapablas rigardi virinon en tramvojo sen penso malpura, ridis en gazetartikoloj aŭ mokis per la plej pezaj ŝercoj. Sed iom post iom la komprenemo venkis kune kun la respekto al idealismo higiena kaj morala.

Neniu proponas iri senveste al oficejo aŭ en vagonaron, sed ankaŭ neniu povas malpermesi al puraj homoj imiti la plej purajn popolojn por siaj sunbanoj kaj gimnastikado en fermitaj teritorioj. Tie la viroj lernas respekti virinojn eĉ per penso. La impresoj de vizitantoj al tiuj naturistaj kampoj estas tre favora.

Precipe impresis ilin la frata kaj ĝentila atmosfero, la familioj kun infanoj kaj la nobla nivelo de interparoloj. Kiu, en ordinara vivo, permesus al si maltaŭgan penson vidante patrinon nutranta suĉinfanon ĉe mamo? Simila homa respekto regas tie laŭ atesto de pastro Huchet, la fama pacifisto franca.

Cetera la formoj de naturismo varias kaj ne ĉiuj asocioj akceptas la plenan senvestecon. Opinioj ankoraŭ diversas pri tio pro la ekzistantaj antaŭjuĝoj en kelkaj landoj.

Plej gravas la ĝenerala emo al aero, suno kaj akvo, la simpligo de vestado kaj zorgo por pli higiena vivado kaj nutrado. La ĝojiga tendenco en ĝi estas la kompreno pri la rilato inter saneco de l' korpo kaj saneco de l' animo. *Mens sana in corpore sano* estas la devizo de la bela Dresdena ekspozicio pri higieno.

Ĝi estas utila devizo, ĉar ĝi montras komprenon pri la vero. La faktoj estas tiaj. Tro longe la homo dividis kaj apartigis aferojn, dependantajn unu de l' alia en proporcio, kiun ĉiuj kuiracistoj konstatas ĉe siaj flegatoj.

En tiuj movadoj al sana vivado aŭ saniga dimanĉa ripozo montriĝas ankaŭ emo al la vero morala. Oni rajtas diskuti tiun aŭ alian punkton, kiu povas eble ŝajni tro fanatika, sed ĉe la fundo kuŝas la gusto de la moderna junularo por la vero, t.e. por rigardo de faktoj brava, senkaŝa, senkomplimenta kaj por trovo de la belo en la naturo anstataŭ en incitaj artefaritaĵoj. Tial ĝin atakas la plej pornografiaj kaj malmoralaj literaturistoj ĉar ili timas perdi klientojn por siaj kaf-koncertaj teatraĵoj.

La modernaj ĝejnuloj perdas iluziojn. Ne bedaŭru. Kiom da familioj detruigis ĉar ili kreiĝis el iluzio. Plej saĝe vidi la homojn tiaj, kiaj ili estas kaj ilin ami kiel homojn anstataŭ adori kiel anĝelojn hodiaŭ kaj bruligi kiel diablojn morgaŭ.

La nuna generacio faras siajn spertojn kaj eble trovas pli certan vojon al feliĉo ol la antaŭa, se ĝi kreskigas internan sanecon kaj homan kompaton. Ekster iluzioj ĝi trovas en la naturo kaj en la veraĵoj ankaŭ ĉarmon, alispecan ol tiu de niaj gepatroj, sed ne malpli valoran.

La junularo mem edukita en naturistaj ekskursoj aŭ somerkampoj entenas iujn el la plej noblaj kaj vere homaj tipoj renkonteblaj. Amikoj de l' naturo, de bestoj, de kreskaĵoj kaj homaj fratoj, ili abomenas militon, mensongon, perforton kaj ruzon. Ili pretigas al si fortajn korpojn, ne por bati, sed por ame labori.

P. B.

REDAKCIA NOTO

Ni atentigas, ke oni rajtas traduki en nacian lingvojn, ĉiujn artikolojn en ESPERANTO, citante la fonton. Tradukonto de la artikolo "Per nova akustiko al nova muziko" sendu ekzempleron de la gazeto kun la artikolo al la inventisto:

Jörg MAGER, Prinz Emil Garten, DARMSTADT (German.)

Era la Mondo Esperantista

Internacia Centra Komitato de la Esperanto-Movado

ŜANĜO DE ADRESO

Dum la kongreso de Helsinki en 1922 la Naciaj Societoj kaj UEA interkonsentis pri komuna elektado de Internacia Centra Komitato, konsistanta el ses anoj, kiu zorgas pri la ĝeneralaj interesoj de la movado kaj okazigas la universalajn kongresojn. Pliposte ICK kreis propran sekretariejon sub la kompetenta direktado de S-ro Robert Kreuz, sekretariejo kiu ĝis nun okupis unu ĉambron en la loĝejo de UEA.

Pro diversaj kaŭzoj montriĝis preferinde, ke la ICK havu apartan oficejon kun propra adreso; sekve de la 1.a de Julio de tiu ĉi jaro la ICK estas instalita:

11, RUE DU MONT-BLANC, GENEVE

Ni petas niajn legantojn ke por korespondadoj al la ICK aŭ al S-ro Direktoro Rob. Kreuz ili uzu tiun adreson.

Okaze de tiu ŝanĝo, la prezidanto de UEA ricevis de la prezidanto de ICK la jenan ĝentilan leteron:

Sheffield, la 1-an de Julio 1931.

S-ro Ed. Stettler,

BERN.

Mia ĥara prezidanto kaj amiko,

Mi ĵus sciigis de S-ro Kreuz ke la ICK jam transloĝiĝis al sia nova adreso kaj mi tial ĥaptas la nunan momenton por esprimi al vi kaj al via komitato, la tutekoran danĥon de ICK por la multnombraj ĝentilecoj kaj la granda helpado kiujn ICK ricevis je viaj manoj en la daŭro de la lastaj ĥvar jaroj.

Estas bedaŭrinde ke la disigo ĥiu ĵus okazis estis la rezultato de malfeliĥaj cirkonstancoj, sed eĥ en tiu momento nia direktoro, S-ro Kreuz, rememorigas al mi, ke li ne povas forgesi la multajn jeliĥajn rilatojn kiujn li havis en via oficejo kaj estas je lia propra sugestio ke mi skribas hodiaŭ por montri al vi, ke ICK vere sincere reĥonas la helpon ĥiun ĝi ricevis.

Nia movado estas en granda bezono de la plej grandaj helpoj kiujn ni povas fari por ĝi kaj tial mi esperas ke la ĵus faritaj ŝanĝoj, anstataŭ malfortigi la movadon, eventuale rezultos en pli bonaj ĥondiĥoj por UEA egale ĥun tiuj por ICK. Kun la plej ĥoraj salutoj sincere kaj samideane la via.

(Sig.) J. MERCHANT.

Prezidanto de ICK.

Radio-Club Espérantiste de France (R.C.E.F.)

La « Radio-Club Espérantiste de France », kies celo estas: Propagando kaj uzado de Esperanto per kaj por Radio kaj reciproke, petas aliĝojn de ĥiuj izolaj samideanoj kaj delegitoj de ĥiuj grupoj esperantistaj kaj radiaj.

Adreso: Inĝeniero Henri FAVREL, ĝenerala sekretario, 27 rue Pierre-Guérin. — PARIS 16^e arr.

Al la Ĉefdelegitoj kaj Delegitoj de UEA.

Estimataj Kunlaborantoj,

La pasintan monaton nia Direktoro okazigis la laŭstatutan elekton de la Komitato. Plie ni proponis al vi du ŝanĝojn de la statuto, el kiuj unu estas grava por la rilatoj de UEA kun la naciaj kaj fakaj societoj. Estas honora devo de la Delegitoj partopreni la voĉdonojn. Malgraŭ tio nur 867 el 2.454 Delegitoj sendis sian respondon. Ĉar la voĉdonado nur valoras, se partoprenis pli ol la duono de la voĉrajtigitoj, la procedo devas esti plilongigata.

Samideanoj!

Facile oni konkludas el via sinteno ke vi malinteresiĝas je la sorto de via asocio, sed feliĥe via varbado kaj servado pravas la malon. Restas do nur la supozo ke vi havas tian senliman konfidon en vian komitaton, ke vi konsideras novelekton kiel superfluan formalajaĵon. Permesu al mi, atentigi vin, ke la komitatoj kiuj silente portas la zorgoplenan respondecon por tiom granda societo, meritas ke almenaŭ ĥiun trian jaron vi pensu je ili.

UEA, la modelo de bona organizaĵo, bezonas komitaton forte apogitan de siaj elektantoj. Ĉar ne povas esti via volo, esti gvidata estonte de provizora registaro, mi petas vin traserĥi viajn tirkestojn, plenigi la voĉdonilojn kaj ilin sendi plej rapide al la oficejo.

Kun samideanoj salutoj.

Ed. STETTNER, *Honora Prezidanto.*

Postkongresa vojaĝo tra la bohemiaj balokoj

Multaj partoprenintoj de la XIII-a Universala Kongreso bone memoras la postkongresan vojaĝon tra la famaj banlokoj Karlsbad kaj Marienbad.

Jam de la kelka tempo tiuj urboj intencis ree inviti la internacian popolon de Universala Esperanto Kongreso, sed la cirkonstancoj ne estis oportunaj.

Ci-jare la grupo « Verda Stelo » en Karlsbad akceptis la proponon de Germana Esperanto-Ligo kaj de la urbestroj kaj mi komisiigis aranĝis la vojaĝon.

Estas neĥese, ke la vojaĝo ne postulu plian monoferon — kaj plue estas neĥese, ke la nacio gastiganta la kongreson ne ofendiĝu, se parto de la kongresanoj forveturas por viziti alian landon.

La unua kondiĥo plenumiĝas, ĥar parto de la kongresanoj veturas de Kraków okcidenten, do rabatita fervojbileto ŝparas tiom da mono, ke la hejma restado ankaŭ ne povus esti pli malmultekosta. La 8 tagoj kostas entute kĥ. 850.— (25 usonajn dolarojn) enkalkulte fervojbileton, noktigojn, manĝaĵojn, trinkmonojn, k.t.p. Se oni veturas sen nia aranĝo, oni pagas pli multe kaj ne vidos tiam da vidindaĵoj. Oni ankaŭ povas aliĝi por parto de la vojaĝo kio malaltigas la elspezon.

La dua kondiĥo ankaŭ respondiĝas. La partoprenontoj de nia vojaĝo ja ne veturas Varsoviajn aŭ alien en Polujo, sed profitus bonan eblecon hejmenveturi. Al tiuj gesamideanoj mi estos gvindonto.

La entrepreno ne estas privata spekulacio kaj ne estas profitdona. Vi demandas kiel mi aranĝis ĥion? Per subvencioj mi povis pagi ĥiujn preparojn komencajn. Insistante pri la propaganda karaktero mi ricevis neatenditajn rabatojn. La ĥambroj estas komfortaj kaj respondiĝas je ĥiuj pretendoj. La manĝaĵojn oni ricevos en unuarangaj hoteloj, riĥe kaj bonege kuirite.

Detala programo postulus tro multe da loko. Krome mi parolos en Kraków pri la vojaĝo. Se vin interesas detaloj, bonvolu ilin demandi esperentlingve ĥe la koncerna kurac-administracio (Kurverwaltung von Marienbad, Franzensbad, Karlsbad, Teplitz-Schönaŭ) aŭ ĥe la foiro de Reichenberg.

La partopreno estas rekomendinda. La vizito de mondbanlokoj dum la kurac-sezono kostus multe pli se vi ne partoprenus la vojaĝon.

Prof. Ing. Josef SCHNEIDER.
Karlsbad, « G E A ».

Mondvojaĝo de ĉspeciala Delegito de ICK


S-ro Jos. R. Scherer

Nia legataro jam estas informita pri la detaloj de la vojaĝo de s-ro. Scherer ĉirkaŭ la mondo. Ni ĉi tie donas ankoraŭ resumon pri la lasttempa laboro.

Post forlaso de Hindujo en Marto s-ro. Scherer atingis *Egipton*. Tie li paroladis en resp. vizitis la urbojn Port Said, Assiut, Fayum (Oazo), El Kahira (Cairo), Aleksandria, ktp.

De Egipto li iris al *Palestino kaj Sirio*, ĉie ĝuante vere amikan akcepton kaj helpemon de izolaj samideanoj aŭ delegitoj de UEA.

En *Turkujo* okazis kelktaga halto nur en Istanbul kun kelkaj paroladoj i.a. de la radio-stacio de ĉi tiu urbo. Per tio unuan fojon Esperante estas publike disaŭdigata en tiu lardo.



S-ro. Liem Tjong Hie, del. UEA, en Semarang, Javo, montras en s-ro. Scherer la ŝtofojn, kiujn ŝatas javaj sinjorinoj.


Plurtaga halto en Ateno ebligis paroladojn en la ĉefurbo de *Greklando*, kiun s-ro. Scherer pro la eksterordinare afabla akcepto forlasis kun speciala bedaŭro pro neebleco de pli longa restado.

Pro nefavora interkomunikiĝo *Sicilio* kaj *Malto* ne povis esti vizitataj.

En *Italujo* s-ro. Scherer haltis aŭ paroladis en Napoli, Romo, Firenze kaj Venezia. Li ankaŭ vizitis la respublikon *S. Marino*. Post vizito de Milano s-ro. Scherer rekte atingis *Svislandon*.

Nun s-ro. Scherer kvazaŭ malaperis en malhelo, nome en malluma ĉambro por riveli centojn da fotobildoj, faritaj dum la lasta vojaĝa parto. En la belega urbeto Bellinzona en *Tiĉino* (itallingva Svislando) li ripozas iomete kaj samtempe preparas la eŭropan parton de sia mondvojaĝo. Laŭ ĉiuj preparoj ĝi certe fariĝos unika sukceso. Komence de Julio la ICK publikigas la definitivan programon por Eŭropo, se ĉiuj societoj bonorde sendas la invitojn ĝis la indikita limdato.

La gazetara kritikisto pri la lastaj paroladoj estas bonega. Tiuj urboj, kiuj sendis invitojn por s-ro. Scherer povas esti certaj pri volara helpo al sia laboro.



S-ro. Scherer kun la Del. de UEA en la Oazo Fayum (Egipto) s-ro. Tados Migalli.

Tutmonda kolektanto

Ilustrita organo por kolektado kaj interŝanĝado.
Specimen-numeron sendas senpage.
A. PRAZÁK, Jablonné n. Orli. ĉeĥoslovakujo.

Interesa Sperto de Esperanto-Instruo

La direktoro de Politeknika Altlernejo en LOS ANGELES konigis al D-ro Charles R. WITT, vicdelegito de UEA en tiu urbo, ke estas la kvina duonjaro dum kiu oni instruas Esperanton en la citita lernejo.

La kursojn gvidas kapabla profesoro diplomita de la ŝtato Kalifornio. Ili okazas trifoje ĉiun semajnon kaj ĉiufoje daŭras du horojn. Tuj de la komenco, la lernantoj korespondas kun alilandaj Esperantistoj kaj ĉe la fino de la duonjaro ili amikiĝas kun personoj, kies spirito estas internacia.

Kvin « credits » por la Atesto pri mezagrada lernado, oni atribuas al la lernantoj, kiuj akurate sekvis la kursojn kaj sukcese trapasis la finajn ekzamenojn¹.

Doninte tiujn sciigojn, la direktoro, « principal » Ralph W. DETTER, aldonas: « Laŭ mia propra opinio, la esperanto-instruo multe helpas la plivastigon de bona spirito civitana kaj la multobligon de la rilatoj inter homoj rase kaj nacie diferencaj. Kun miaj bondeziroj por la sukceso de la movado ».

(Internacia Gazetara Komisiono)

¹ Unu « credit », en la usona ekzamen-sistemo, egalvaloras unu dekkesonon de la poent-sumo, kiun la ekzamenito devas havigi por sukcesi. La « Atesto pri mezagrada lernado » rajtigas la posedanton fariĝi universitata studento.

Esperantistaj problemoj

VIII

UEA kaj Naciaj Asocioj

UEA fondiĝis pro duobla bezono: kunigi internacie la personojn lernintaj la lingvon, starigi per iliaj kotizoj kaj kunlaboro daŭran kontakton, internacian kaj praktikan uzadon de la lingvo. Ekzistis tiam en 1908 aro da landaj societoj kun la esprimita celo « *reprezenti la movadon enlande kaj propagandi la enkondukon de la lingvo* ». UEA evoluiĝis sinsekve, starigis servojn sed ĉefe kuntenis en firma fasko avangardon de l'Esperantismo: La Deleĝitojn kaj la membraron, kiuj jen servante jen pagante, permesis ke Esperanto havu centran organizon, sendependan de ekstera influo. Historio kaj tradicio pruvas, ke la provita vojo estis ĝusta kaj estos tiel por longa tempo ankoraŭ. La Nacia Societo evoluiĝis en alia senco: Al reprezentado kaj propagando venis la instruado kaj la taskoj ligataj al ĝi. Ekzamenoj, preparo de esp. instruistoj (kursgvidantoj).

Jen en kelkaj linioj la esenco kaj celo de nacia kaj internacia agado. Laŭ la monrimedoj iuj naciaj societoj starigis servojn tute konformajn al propra agado: Jara kunveno, eldono, k.a. Sufiĉe da taskoj kaj neniam sufiĉe da mono por plenumi ĉion konstante, regule kaj efike.

Ŝajnas el tio, ke ambaŭ formoj de organiziĝo povas kaj devas harmonie labori: ĉiu laŭ specialeco kaj difino. Sed jam en la unua epoko de UEA aŭdiĝis plendoj, ke UEA, « *rabas la homojn varbitajn de l'nacia societo* ». Unuvorte ke UEA rikoltas, ne seminte. Tiuj plendoj vere nur venis de certaj societoj, ne oficiale, tamen en tia formo, ke la tiama estraro devis pri ĝi okupiĝi. Rimarkinde estas, ke precize samaj plendintoj regule akcentis la gravecon kaj nepran bezonon de UEA. Pri la pretendita homrabado valoras rimarko: Facile estas starigi kurson kun nombro da lernontoj: Majstroverko konservi 2/3-on de l'kursanoj ĝis la fino, kaj vera arto estas konservi el tiuj kvinonon por la organizo. Kiu eltrovos efikan rimedon, radikale ŝanĝi tiun staton, meritas la titolon « *savinto de l'patrolando* ». La kaŭzoj de tiu ĉi misproporcio inter klopodo kaj efiko estas variaj. En alia artikolo ni revenas al tio.

Post la milito silentiĝis la plendo supre citita. La pozicio de UEA, pro la nekontestebla efiko de ĝiaj servado kaj klopodado dum-kaj postmilita tempo ŝanĝis. Interkonsento kun la Naciaj Societoj kondukis al organiza formo, kreante interligon kun UEA. Estas la kontrakto de Helsinki, kiu starigis ligilon nome la ICK (Internacia Centra Komitato).

La idealan solvon, krei unu organizaĵon, malebligis nesufiĉeco de riceveblaj rimedoj kaj la nesameco de l'organiza strukturo de la Naciaj Societoj. La formo de libera interkonsento, renovigebla kaj ŝanĝebla, respondas nete al la donita situacio, ankoraŭ ne ŝanĝinta depost 1922.

Post kuraĝiga restariĝo de la movado de 1919-1925 venis certa halto, kaŭzita de preskaŭ nur eksteraj cirkonstancoj kaj al la nekontestebla spirita revolucio, precipe en landoj militintaj. La ciferoj de la Esp. Societoj tion klare pruvas: ekzemploj):

Nacia Societo :
kalkulis anojn :

UEA :
kalkulis anojn

| Lando : | 1925 | 1930 | 1925 | 1930 |
|-----------|------|------|------|------|
| Bulgarujo | 920 | 500 | 210 | 191 |
| Ĉeĥoslov. | 1700 | 1200 | 1147 | 1337 |
| Finlando | 220 | 70 | 139 | 104 |
| Germanujo | 3046 | 2191 | 1889 | 1406 |
| Hungarujo | 550 | 250 | 250 | 120 |
| Italujo | 1825 | 1200 | 338 | 265 |

Tiu ĉi malprogreso ne okazis en ĉiuj landoj. En iuj, Nederlando, Svedujo kaj Estonio kontraŭe, ni notas esperplenan progreson, dank' al la kursoj de pastro Andreo Ĉe. La bildo ne estas preta, ne menciante la laboristajn societojn, kiuj apartiĝis de la ĝenerala movado. Interesa estas jena komparo :

| Lando : | Nacia Societo : | | Laborista Societo : | |
|------------|-----------------|------|---------------------|------|
| | 1925 | 1930 | 1925 | 1930 |
| Finlando | 220 | 70 | — | 200 |
| Germanujo | 3046 | 2191 | 3500 | 4000 |
| Hungarujo | 550 | 250 | 800 | 1720 |
| Meza stato | 1858 | 837 | 1433 | 1973 |

Malprogreso : 44-45 %

Progreso : 34-35 %

Ne forgesinte ankaŭ estas katolikaj societoj esperantistaj, kiuj formiĝis en kelkaj landoj. Ili ankaŭ kaŭzis ioman formigran de anoj el la tiel nomata « *neŭtrala* » kampo. Konstato sen riproĉo ! Tiu ĉi videbla malprogreso rezultis la serĉon de l'kulpulo. Kaj denove UEA devus esti la nigra besto, la hom-rabanto. Simpla komparo de l'ciferoj pruvas la senfundecon de ebla aserto tia. Tamen ĝi aŭdiĝis. Unu nacia societo sendis al ni liston de Deleĝitoj de UEA kiuj ne estas samtempe anoj de la koncerna societo nacia. Por koni la kaŭzon de tiu « *flankenstaro* » ni entreprenis enketon, kiu en sia tuto estas interesega dokumento. Ni paroligu ciferojn :

UEA havis 360 D kaj VD en tiu ĉi lando. El ili 130 ne estis anoj de la enlanda societo (36 ĝis 37 %).

El la 130 ne respondis nian enketon 42. Restas 88 Ĥiuj respondis. Kaj nun venas la interesa detalo : Se tiuj 88 havus saman kaŭzon de nealigo al la nacia societo, tiam la solvo de la problemo estus ja simpla. Fakte la rezultato montris la jenon :

- 1) Ne estis anoj pro disigo de la loka grupo 16
- 2) Apartenas al Laborista Grupo kaj ne volas esti anoj de « *Nacia Societo* » 5
- 3) Ne montris specialan kaŭzon de ne-aligo 6
- 4) Ne povas esti anoj pro manko de mono 15
- 5) Opinions jam estis anoj pere de sub-ligo 6
- 6) Plendas pri troeco de Esp. organizaĵoj 7
- 7) Kontraŭis nacian organizon aŭ kritikis la organizon pro detaloj nekonvenaj 24
- 8) Aligiĝis al la nacia societo sekve de nia enketo 9

El tio vidigas la manko de unusenca respondo, kiu klare montras la situacion. Kaj ĝuste tiu — ĉi « ne-unuseneco » malfaciligas ŝanĝi stacion, certe ne deziritan. Fako grava estas la manko de intereso ĉe multaj pri organizo. Tien-ĉi oni povus meti la 42, kiuj ne respondis al la enketo. Ili certe kontentigas kun la nuna situacio kaj ne deziras alie. Alia kaŭzo estas la monmanko. Kaj precize pri tio UEA mem rajtus plendi. En kelkaj landoj ĝi perdis anojn ĝuste pro manko de mono de l'anoj. Tamen la kaŭzoj de malprogreso ĉe certaj societoj naciaj estas pli profundaj. En estonta artikolo ni revenas je tiu ĉi problemo, kies solvon eble alportos la tempo. UEA deziras harmonian kunlaboron kun la naciaj societoj kaj volonte ekzamenos proponojn. Sed ĝi energie rifutas supozon de intencita malhelpado. Kontraŭe: Kie nacia societo bone fartas, UEA proporcie fartas bone. Konstatu facile provebla per ciferoj.

H. J.

Internacia Postkongreso Esperantista

Bialystok : 12-13. Aŭg. 1931.

Adreso : Bialystok (Polujo) Poŝtkesto 120.

Ni havas la honoron komuniki al la esperantistaro, ke post la 23-a Universala Kongreso en Krakovo kaj la Postkongreso en Varsovio, nome je la 12-13 de Aŭgusto okazos en Bialystok — *La Naskurbo de nia Majstro*, sub la alta protekto de la Bialystoka Vojevodo kaj auspicioj de la I.C.K. de la Esperanto-Movado.

II. Internacia Postkongreso Esperantista, kaj

Solena ceremonio de Zamenhof-Monumento starigota al nia Majstro en lia naskurbo.

Ni plej kore invitas la esperantistaron partopreni en la Postkongreso kaj la Monumento-Soleno honorigante la memoran de nia neforgesebla Majstro.

Ĉiuj gesamideanoj, kaj aparte la landaj reprezentantoj (el Polujo ankaŭ reprezentantoj de urboj) venontaj al nia Postkongreso, estas *insiste petataj kunporti el sia hejmo pli aŭ malpli grandan pecon de briko aŭ ŝtono*. Tiuj metitaj dum la Monumento-Soleno estu la bazo de la fundamento, sur kiu ĝi staros kaj simbolu ke estas konstruata el la brikoj de la tuta mondo, de la tuta esperantistaro. La Monumento mem, konstruata laŭ la distingita projekto de fame-konata varsovia skulptisto A. Ostrzega prezentas kolosan konstruaĵon (dimensioj 7x4 metroj, alteco ĉirkaŭ 12 metroj) — la restarigitan Babelan Turon, — kiu certe estas la plej trafa simboligo de la triumfo de l' ideo de nia Majstro.

Samtempe ni anoncas la kolekton de monoferoj por la Monumento-konstruo. farata sub la kontrolo de I.C.K. Sur alia loko ni donas la necesajn informojn. Ni petas plej rapide kaj senavare monoferi. *Car la afero urgas, ne prokrastu kaj faru tion tuj*. Esperantistaj grupoj, landaj organizaĵoj kaj apartaj samideanoj, dezirantaj helpi al la monokolektado turnu sin al ni por ricevi la necesajn informojn.

Pri la Postkongreso vidu poste la praktikajn informojn. Ni atengigas nur, ke dank'al la proksimeco (nur 3 hora vojaĝo de Varsovio), malaltaj kostoj de vojaĝo kaj restado kaj interesa programo neniu domagos la viziton de Zamenhof-naskurbo, kie li trovos abundan esperantistaron, Zamenhof-naskodomon, esperantan teatron revuoprezentadon, ekskurson al unikaj arbaroj kaj lagoj kaj fine — la plej grava partoprenos en la *Granda Ceremonio, Eterniganta la Memoron de nia Majstro*.

Provizora Programo : 12-a Aŭgusto

- 12.40. Akcepto de la karavano en la stacidomo.
- 13.30. Monumenta soleno. Paroladoj de reprezentantoj.
- 15.00. Komuna tagmanĝo.
- 16.00. Vizitado de Zamenhof-domo kaj de la urbo.
- 18.00. Postkongresa Kunsido.
- 20.00. Prezento de la Esperanta Revuo-Teatro « La Verda Muelejo »
- 20.30. Komuna vespermanĝo. 23.30. Internacia kostum-balo.

Informoj

Kolizo. Sv. Fr. 5 Zl. — p. 8.00., entenanta ĉiujn aranĝojn krom la ekskursoj, manĝoj kaj hotelo. Aligilojn petu de ni.

Pagmaniero. Per postmandatoj, poŝtĉekoj (Poŝtĉekkonto : Zamenhofa Esperanta Societo en Bialystok Nro 64. 621) prefere per monbiletoj en registrita ŝetero. Aligilojn kaj pagojn akceptos ankaŭ niaj reprezentantoj dum la Kongreso en Krakovo kaj Postkongreso. en Varsovio, kiuj ankaŭ informos detale.

Monoferoj por la Monumento : Specialaj monoferdeklaraj kaj brikoj riceveblaj, ĉe ni senpere, ĉe la Kongresa Komitato, U.E.A., kaj ĉe niaj landaj reprezentantoj en la tuta mondo.

NACIAJ KONGRESOJ

en Breslau 31 Julio

Antaŭ-Kongresa-Kunveno

Urbeŝtraro de Breslaŭ bonvenigos travojaĝantajn kongresanojn la 31-an de Julio en la belega salono de urbeŝtraroj. Breslaŭaj grupoj urĝe petas trapasi nian urbon irante al Krakovo. Tio ne estas ĉirkaŭvojo por vi, sed ni bezonas vian ĉeston por kelkaj horoj por montri al skeptika logantaro, ke Esperanto vivas. Krom tio vi povas ĝui la belecon de antikva kaj samtempe moderna grandurbo.

Anoncu vin baldaŭ ĉe al delegito ; Siegmund Freund, Breslaŭ 1, Blücherplatz 9.

Finnlanda

La 24-a jarkunveno de la Esperanto-Asocio de Finnlando okazis en la ejo de Socia Altlernejo, Helsinko, la 5-an de aprilo 1931. Oni elektis magistron Vilho Setälä kiel prezidanton de la kunveno. Kiel prezidanton de la Asocio oni re-elektis staciestroon Hugo Salokannel (Salminen), kiel vicprezidanton instr. Ilmari Rautio (Suomenlinna), sekretarion magistr-edzinon Aini Setälä (Mechelinik. 24, Helsinko), kasiston Finon Helmi Koivuniemi (Tempelikatu 17, Helsinko). Ĉar la gazeteto « Esperanto-Uutiset » jam multajn jarojn neregule aperadis, kiel granda malutilo po E. movado en Finnlando, depende de pluraj malfacilaĵoj, Esperanto-Instituto de Finnlando promesis novaranĝon de la afero. La mondvojaĝanton sron Scherer oni decidis akcepti kun plezuro sed bedaŭris nur la mallongan tempon rezervitan por nia lando. Por la propagando oni starigis specialan fondon, je kiu la ĉestantoj notis jam beletan sumon. Veterano de la E. movado en nia lando, afergvidanto K. J. T. Kuntsi donacis, krom tio, 2000 mk.

Samvespere je la 7.30 okazis agrableta soleneto en la sama ejo. Unue kantis blinda kantisto Karl Aberg el Porvoo, deklamis instr. Ida Siaranen, salutparolis f-ino Tyyne Leivo kaj kantis s-ino Aini Setälä. Magistr Vilho Setälä parolis pri la mondvojaĝo de finna esperantista familio en lagaro Saimaa per motorboato. Fine sro Salokannel legis la alvenintajn salutojn-telegramon de sro Nylén el Svedujo kaj salutojn el Danujo, Belgujo kaj Latvujo. Li ankaŭ dankis helsinkianojn pro la amuza festeto.

La kunveno doninte novan esperon pri revivigo de E. en Finnlando estis finata per kantado de E.himno.

Kiel neŭtrala centra societo por la tutlanda E. movado funkcios post la nuna jarkunveno la garantia societo de la « Esperanto-Instituto » de Finnlando, al kiu societo apartenas anoj de diversaj landaj E. asocioj.

Franca kongreso en Dijon

23-25 Majo.

Partoprenis 150 kongresanoj. Okazis du laborkunvenoj dum kiuj 25 objektoj estis traktitaj. Inter ili la kutima elmontrado de la situacio nuna de la movado, donita de S-ro Couteaux, financoj, Maison de l'Espéranto, internacia organizo (Generalo Bastien) turismo kaj fine la universala kongreso en Parizo okazonta en 1932, dum kiu okazos ankaŭ la Franca kongreso. La elektaj al la administra konsilantaro rezultigis por S-ro Archdeacon 1674, Por S-ro Belhoste 1586 por S-ro Férez 1464 kaj por S-ro Pouchot 1399 voĉoj, ĉe 1674 voĉdonantoj kaj absoluta plimulto de 838. Ĉe la ferma bankedo prezidis S-ro Gaston Gérard, ŝtatestretario por turismo. membro de la franca registaro. Inter fremdaj gastoj trovigis S-ro Rob. Kreuz, Direktoro de la I.C.K. La kongreso finis kun danko al la organizintoj S-ro Ferrain kaj S-ino Tournamille.

(Laŭ Movado, Junio)

Hungara en Budapeŝto

Okazis dudekjara ĝenerala kunveno de Hungarlanda Esperanto Societo. Prezidanto fariĝis prof. Jozefo de Mihalik, estinta prez. de Univ. Kongr. 21-a. Vicprez. : dro. I. Loránd kaj P. Tolnai, ĉefsekr. : Otto Reiner. 22 societoj estis reprezentitaj, inter ili la Landa Instruata Konsilantaro kaj Ligo de Gepatroj. En nomo de UEA salutis ĉefdel. l. Balkányi. Per granda aplaŭdo oni akklamis, ke dro. K. de Kálcsey kaj dro. Jozefo Takács estis nomataj honoraj membroj de HES!

XVI-a Itala kongreso

Padova : 25-28 julio 1931

La Esperantista grupo de Padova akceptis la taskon organizi la 16-an kongreson de italaj esperantistoj. La komitato prezidas la urbestro de Padova (podesta) S-ro D-ro Ing. Francesco Giusti del Giardino. La programo antaŭvidas krom la kutimaj laborkunvenoj ekskursojn en aŭtomobilaj al vidindaĵoj, konkurso de la Itala katedro de Esperanto. Detalajn informojn oni petu de S-ro Giovanni Saggiori, Corso V.E. 6, Padova.

Postkongreso eu Budapeŝto

Organiza komitato sub prezidanteco de D-ro Kalcsey vigle laboras por agrabligh restadon du-tri tagan en Budapeŝto, kie neforgeblajn tagojn pasigis la partoprenintoj de la XXI-a Kongreso Esperantaj prospektaj kaj fotoafiŝoj je dispono. Adreso : Esperanto-Kongreskomitato, Budapeŝto, VII, Dohány-utca 76.

20-a Germana Kongreso

Hamburgo 1931 - Pentekosto

La dudeka kongreso de la Germana Esperanto-Asocio estis jubilea. Pasis 25 jarojn, ke en Braunschweig fondiĝis la tiama « Germana Esperantista Societo » el kiu evoluigis la nuna GEA. Deksespaga bele presita broŝuro¹ germanlingva, skizas la evoluon de unu el la plej malnovaj landaj organizadoj. Por malnova batalanto tia ririgardo estas samtempe malĝojiga kaj ĝojiga: Malĝojiga pro la perdo de tiom fervoraj kunbatalantoj kaj ĝojiga, ke malgraŭ ĉiuj sinsekvaj malhelpoj, la arbo Esperanto ne pereis en Germanujo, tiom grava lando por nia afero. Pri la broŝuro ni parolos ankoraŭ aliloke.

La kongreso mem staris sub la influo de la ekonomia krizo, skuanta Germanujon kaj ankaŭ sub la brila arango de la pasintjara en Dresden. Prave siatempe la prezidanto de la GEA rimarkigis, ke la hamburganoj havas nefacilan taskon. Ni konstatu: La kongreso en Hamburgo bele sukcesis. Akcepto oficiala per la Senato de la Hanse-urbo de la estraro kaj eminentaj kongresanoj, alparolo de la urbestro D-ro Petersen, Interkonatiga vespero dum kiu nelacigebla samideano Karl Minor parolis en la sendstacio pri nia afero laŭ konata sprita kaj lerta maniero.

Dum la malfermo de la kongreso parolis D-ro Theodor Steche, lingvisto, filo de altmerita D-ro Albert Steche pri « *Sprachwissenschaft und Welthilfssprache* ». Tiu ĉi tradicia festparolo estis disaŭdigita per radio. Senatano Platen bonvenigis la kongreson en la nomo de la Hamburga registaro.

La laborkunveno pritraktis la kutimajn negocojn, raportojn, financojn. La stato de la GEA montris je la fino de 1930: 9 landajn ligojn, 123 lokajn grupojn, 131 izolajn kaj 2240 membrojn.

Inter la plezur-arangoj estis kompreneble ekskurso al haveno, vizitoj de la Hapag-ŝipo « Albert Ballin » de la urbo kaj neforgesinde: Stellingen, la grandioza besta parko de Hagenbeck.

La anoj de UEA kunvenis en aparta kunsido, kie ĉefdelegito A. Münz, Berlin faris raporton.

Entute la tri organizintoj de la kongreso, samideanoj Bünemann, Epstein kaj Minor faris sian eblon kaj vere meritis la koran dankon al ili esprimitan. (Ubikitulo).

UEA kaj GEA

Interesa ero en la rerigardo de la Germana Asocio estas jena citaĵo: (D-ro Mybs dum la kvara kongreso en Gotha 1909).

Unsere Organisation wird in Einklang zu setzen sein mit derjenigen der UEA; die Grundlage auf der wir aufbauen müssen, scheint vor allem eine gegenseitige ausdrückliche Anerkennung dieser beiden grossen Faktoren als offizielle Vertreter der Esperanto-Bewegung des In- und Auslandes. Dann dürfte auch die UEA in Deutschland in Zukunft ihre Beamten ausschliesslich aus den Reihen der G.E.S. erhalten, so dass es nicht mehr vorkommen kann, dass infolge persönlicher Unstimmigkeiten, Unzufriedene versuchen, unsere deutschen Gruppen der Gesamtbewegung zu entfremden und unter dem Deckmantel irgendeines rein äusserlichen Titels Sonderbestrebungen nachzuhängen. Andererseits muss die UEA an der G.E.S. die stärkste Stütze haben, und ihre Interessen und Geschäfte werden vielfach gleichzeitig von ihr wahrgenommen werden können. So gibt es einen guten Klang.

Tio signifas ke UEA kaj GEA laboru en harmonio kaj en interkonsento. Tion ankaŭ deziras la estraro de UEA kaj ĝi amike invitas siajn Delegitojn, kiuj ne partoprenas la landan movadon, aliĝi al la enlanda societo, tiel fortigante tiun necesan kolonon. Apud la internacia uzado de la lingvo restas ĉiam la enlanda daŭra batalo por la enkonduko kaj propagando. Unu klopodo kompletigu la alian.

UEA Kunveno

Solothurn, Svislando.

Okaze de la Svisa Esperanto — tago en Solothurn, Majo 1931 la ĉeestintaj membroj de UEA estis kunvokitaj por kunsido de UEA. La plej malnova Delegito de UEA en Svislando, Sinjoro Jayet en Morges malfermis la kunsidon je la 9 ½ h. per agrablaj salutvortoj. Ĉeestis prokz. 30. anoj. S-ro Javet tuŝis diversajn aferojn de UEA, i.a. pri la Jarlibro, la jurnalo, Respondkuponoj, gvidlibroj, libreja fako kaj alvokis la gemembrojn kaj Delegitojn, vigle uzadi la servojn kaj varbi sendese membrojn; ĉiam ankoraŭ ni staras en tutmonda, ekonomia krizo, kiun forte sentas nia internacia organizado, malhelpigata pro tio, disvolvigi la disvastigon kaj firmigi la financon egalpezon.

En la sekvinta diskutado parolis D-ro Spielmann kaj kiel gasto D-ro Meyer-Saarbrücken, ambaŭ forte substrekante la nepre necesan ekzistadon de UEA.

En kutimata, bonega maniero, parolis ankaŭ nia tre ŝatata prezidanto S-ro Ed. Stettler, kies paroloj instigis certe ĉiun al senlaca aktiveco kaj volonta interhelpo.

Pro la tuj komenca jara ĉefkunveno de la Svisa Esperanto Societo S-ro. Jayet povis fermi la kunsidon je la 10 ½ h. H. K.

¹ Deutscher Esperanto-Bund E.V. — Ein Rückblick auf 25 Jahre 1906-1931. Zusammengestellt von Postrat Behrendt, Vorsitzendem de D.E.B. 16 p., 22 x 16 cm. Presis Paul Göring, Magdeburg.

Internacia Cseh-Instituto de Esperanto

Adreso : Oostduinlaan 32, Hago

(Resumo de Informoj)

Aligoj. — Aktivaj membroj 86, subtenantoj 44.

Arnhem. — Oficiala kurso por nederlanda instruistaro en la Esperanto palaco en Arnhem sub protekto de la urbestro. Kursotizo guld. 7.50. Kursanoj loĝas en la belega Esperanto-domo (palaco) moderne instalita. Pensiono komplete de tri ĝis 4.50 guld.

Balta Maro. — Internacia kurso por estona, finna, latva kaj litova instruistaro en Tartu (konata kiel malnova universitata urbo Dorpat). Daŭro de la kurso 11 tagoj. La kurso estas sub la protekto de la estona klerministerio.



Vidajo de l'Esperanto-Domo en Arnhem.

Direkcio: S-ro Emil Dauge, prezidinto de la Gruparo Berlina kaj iniciatinto de la Ĉe kursoj en Berlino, eniris la direkcion de l'instituto kaj transloĝis Hagon.

Inauguro de la E domo. — Ĝi okazos en Arnhem la 11-an de Aŭgusto 1931. Kun la domo estas ligita Esperantista hotelo.

Konversacia Gazeto. — Estas preparata konversacia gazeto disdonanta je la fino de kurso al la kursanoj. Aplekso: 24 x 32 cm. Ĝi enhavas legaĵojn pri ĉio kio povos interesi novan esperantiston.

Krakova Kurso. — Urbestro de Krakovo invitis pastron Cseh oficiale por gvidi tiun kurson. Enskribiĝis ĝis fino de Junio pli ol 200 personoj. Kursanoj pagintaj la kotizon de 20 Zl. — 12 Frk. sv. rajtas partopreni la seminarion.

Loterio. — Por trovi la necesajn rimedojn funkciigi ĉion la Instituto ricevis permeson starigi loterion. Estas eldonata 25.000 lotoj ĉiu por unu guldeno. Ĉefpremio estas 5 persona Nash automobilo ses-cilindra kaj pliaj naŭ ĉefpremioj. — Entute mil premioj. Informojn kaj mendojn oni adresu al: F-ino, J. E. Rijkers, Anton de Haenstraat 122, Hago, Nederlanda poŝteko: Den Haag 96085.

Seminario. — Por disponi pri instruistoj kaj kursgvidantoj laŭ la Ĉe-metodo, okazos seminaria instruado en Krakov sub gvido de S-ro Cseh mem. Kotizo estas 8 zlotoj — 4 Frk. sv. — Rajtas partopreni nur profesiaj instruistoj kaj instruantoj de Esperanto. La programo entenas:

Preleĝo pri la kursmetodo (Principoj de la metodo) Teknikoj de la aplikado (Konsilaro) Praktikaj prov-ekzemploj Raportoj de diverslandaj instruistoj) Diskutado.

FARU PROVON

vi estos surprizata

kiel bone funkcias aĉeto per

K E U Dresden-Radebeul

Esperanto en Estonio

En la vico de landoj kie dank'al la energia penado de pastro Andreo Cseh, Esperanto revivigis, estas ankaŭ Estonio. En la ĉefurbo Tallinn (Reval) nun ankaŭ la tramistoj partoprenas kurson. Jam estis, kurso por policistoj kaj hotelservistinoj. Vigla turisma rilato kun Svedujo per la zorgaj de la Esp. Turismaj komisionoj kreis grandan intereson. Finas nun kurso de tramistoj gvidita de S-ro H. Rikand. Partoprenis 45 personoj. La urbestro monhelpis per 200 Kg. (Frk. sv. 275.-).

De 26. Junio — 15. Julio okazis en la universitata urbo Tartu (Dorpat) oficiala instruista kurso de Esperanto por la Baltaj landoj, kiun arangis la « Estonia Instruista Ligo » kun subteno de la kulturministerio. La ministerio disponigis por tiu celo 350 est. kronojn. Instruistoj Andreo Cseh mem. Kursestro estis s-o direktoro V. Rukaus, Kalda 16-8, Tartu, Estonio. (Laŭ Henr. Seppik)

Esperanto en Shanghai

La sesa jarkunveno de la Ŝanhaja Esperanto-Asocio okazis 12-an de Aprilo. Prezidis S-ro Li Wei Yoh. Post diskuto de diversaj proponoj



Ĉinaj samideanoj en Ŝanhajo.

sekvus elekto de la nova komitato. La kunveno finis per gaja kunestado en restoracio. (N.C.F.).

San Antonio de Padova

1231.—1931.

Padovo dissendis al la tuta mondo inviton por la Festoj de la VII.-a jarcenta datreveno post la morto de S. Antonio el Padova.

Al la invito la tuta kristana mondo entuziasme respondis. La datrevenaj Festoj, komencis dum Aprilo por daŭri ĝis Oktobro 1932.

De la tuta mondo, oni anoncas la alvenon de Pilgrimoj, dum Padova per la konstruo de taŭgaj hoteloj, per la perfektigo de ĉiuj publikaj servoj, en atmosfero de altega fervoro, sin preparas ricevi kaj inde gastigi la fidelulojn kiuj alkuross al ĝia Sanktejo.

Estas same intensiva la organiza agado por la grava Internacia Ekspozicio de nuntempa Kristana Arto kiu restos malfermata de Junio 1931 ĝis Julio 1932; al tiu jam aliĝis krom la plej bonmeritaj italaj artistoj ankaŭ fremdaj, ĝis el sep nacioj. Dotita de 100000 it. Liroj por premioj, kaj lokata ĉe la konstruajaro de la Internacia Specimeno-Foiro, en impona arkitekta konstruaĵo, laŭ bazilika formo ĝi promesas jam de nun fariĝi arta okazintaĵo de la plej granda graveco kaj de la plej vasta eho.

Al la alvoko jam disdonita post nemulte sekvos broŝuro kiel gvidlibro kaj propagandilo, kiu enhavos la tutan programon de la festoj kaj anoncas la faciligajn favore de la pilgrimantoj.

Oni publikigos la oficialan afiŝon, kiu en la tuta Eŭropo kaj trans la Oceanoj portos la sugestian vizon de la antikva Tombo de la Sanktulo.

Turismo

Ĝojiga estas la apero de turismaj presaĵoj en Esperanto. Inter la lastaj ni citu:

AUSTRIO

Plurkolora faldprospekto, bruna fono, longa 68,5 cm. alta 25 cm. kun belaj bildoj laŭ fotografajoj, plie kolora karto geografia. La tradukon de la teksto prizorgis Registara Konsilanto Hugo Steiner. La belan presaĵon eldonis la Ministerio por Komercio kaj Trafiko en Vieno. (Ricevebla senpage per la Turisma Servo de UEA)

VARNA

(la reĝino de la Nigra Maro)

Libreto, 17,5 x 12,5 cm kun kolora bildoj sur la kovrilo, informas pri tiu ĉi bulgara urbo apud la Nigra Maro. 36 paĝoj, dudeko da bildoj, kaj geografia karto. Anoj de okcidentaj landoj kun envio rigardas la prezojn: Kompleta tagmanĝo en unuaranga restoracio 40-60 levoj, kio estas 1.50-2.25 Frankoj svisaj! La libreto estas ricevebla de la « Kurortbjuro en Varna ».

Lazné Belohrad.

Klariga libreto pri banloko Belohrad en Ĉeĥoslovaka Respubliko kaj kompletaj informoj pri la Esperantista libertempo, organizita de UEA, teritorio ĉeĥoslovaka. Individuajn informojn pri la Esperantista Libertempejo oni povas postuli de la teritoria oficejo de UEA, Husovo, n.ĉ. 628-a en Hradec-Králové.

PLZEN — PILSEN

Kiu ne aŭdis jam pri tiu urbo, tiom konatan pro ĝia produktajo, la biero? Belega preskaŭ luksa gvidlibro, 18,5 x 13,5 cm., 50 duoblaj paĝoj, falditaj informas pri ĝi en lingvoj ĉeĥa, angla, franca, germana, pola, serba kaj en Esperanto. Pli ol kvindek bildoj bone sukcesintaj ornamas la libron. La teksto estas bona, taŭge presita kaj ne tro detala.

PADOVA

La komitato por la festoj okaze de la sepcentjara datreveno de la morto de Sankta Antonio eldonis broŝuron informen, gvidlibreton por la pilgrimantoj. 17,5 x 12,5 cm 32 paĝoj, 12 bildoj. La tradukon prizorgis la Delegito s-ro Giovanni Saggiore.

KRAKÓW

Okaze de la 23-a kongreso de Esperanto aperis faldprospekto kun utilaj informoj pri la urbo, ekskursaj lokoj k.t.p. Samtempe la kongresa komitato eldonis belan koloran afiŝon. Ekzemplerojn de la gvidfolio oni postulu rekte de la Loka Kongresa Komitato, 234 Lubicz, Kraków.

VIENO — WIEN.

Okaze de la Internacia Laborista Olimpiado 19-26 de Julio la organiza komitato eldonis faldprospektojn en pluraj lingvoj kaj en Esperanto. Tre altira afiŝo, alta 80 larĝa 30 cm kun teksto en Esperanto atestas pri la grava atento kiun donas la komitato al nia lingvo, deklarita kiel sola internacia lingvo dum la olimpiado. Bedaŭrinde esp. sportistoj ne sufiĉe eluzis tiun bonan okazon por aranĝi ion je konvena tempo t. e. ne dum la lastaj semajnoj sed monatojn antaŭe. (Laŭ Fr. T. Aussig)

Liechtenstein.

Vizitu la princlandon Liĥtenŝtejno, estas la titolo de gvidfolio kvarpaĝa eldonita de la Turisma Unuiĝo de Liechtenstein en Vaduz, sub aŭspicioj de la Turisma Servo de UEA. Ĝin tradukis Robert Kreuz, L.K. kaj presis Heroldo de Esperanto, kun kiu ĝi estis sendita. Estas la dua eldono de tiu ĉi folio. Mendebla ĉe: Liechtensteinischer Verkehrsverein, Vaduz, aŭ ĉe Turisma Servo de UEA.

ĈE LA BORDO DE L' REJNO

Du sinjorinoj, lingvo-profesorinoj proponas hejmon agrablan kaj komfortan al junaj fraŭlinoj dezirantaj studi lingvojn germanan, francan, anglan aŭ Esperanto.

Prezo: 150 Germ. Markojn por unu monato. Plej bonaj referencoj. *Ŝribu al*: THIEL, Victoriastrasse 31-III r. KOBLENZ (Germanujo).



Internacia Polica Ligo

Oficiala Informilo

Sukcesplena kurso inter la policianoj en Oslo!

Raporton pri tio ni dankas al sinjoro Pålŝen, konata pioniro de la Esperanta-movado. Jene li raportis:

Dum kelkaj jaroj jam bruletis fajrero por Esperanto inter la policianoj de Oslo. Ĉi tiu fajrero last-printempe fine ekflamiĝis dank' al Rezolucio de Kolonjo. La energia pioniro por nia afero, sinjoro Anders Hagen, policisto, en Oslo, Skippergaten 36, lerte eluzis ĉi tiun gravan momenton por sukcesplene starigi Esperantan Klubon inter la policistoj de Oslo. Ĉi tiu klubo eĉ fondiĝis agnoskita kiel subgrupo de la Policistara Asocio de Oslo kaj ankaŭ ricevis helpon de ĉi tiu Asocio de 100 kronoj.

La klubo krome aliĝis al la Norvega Esperanta Ligo kaj al la I.P.L. La prezidanto de la klubo, la nomita sinjoro Hagen, samtempe funkcias kiel landa delegito de I.P.L.

La klubo tuj komencis varbadon kaj sukcesis arangi kurson inter la policianoj laŭ metodo Ĉe. La policestro disponigis la necesan klasĉambron en la polica lernejo de Oslo senkoste. Provelciono tie okazis je la 26.2.31 sub gvido de sinjoro Pålŝen. 27 personoj aliĝis al la kurso, inter ili du sinjorinoj kaj knabo, filo de sinjoro Hagen. Pro la tre varia polica deortempo necesiĝis du paralelkursoj po du horoj trifoje semajne. Kiel kutime ĉe la Ĉe — kursoj la intereso de la lernantoj konstante kreskis kaj la kursoj plene sukcesis.



La fiksitaj 48 lecionoj finiĝis je la 4.5.31. Dum la lasta leciono kolektigis ĉiuj partoprenantoj de ambaŭ kursoj. Krom kelkaj malnovaj esperantistoj ankaŭ invite ĉeestis la policinspektoro de Oslo kaj la redaktoro de la Norvega Polica Gazeto. Post la disdono de la diplomoj la policinspektoro gratulis pri la rezultoj atingitaj, kiujn li juĝis tre atentindaj konsidere la mallongdaŭran kurson. La provelciono estis partoprenita de li. Ankaŭ la redaktoro de la Norvega Polica Gazeto gratulis kaj promesis daŭran favoron rilate al la propagando per sia fakrevuo. Li rimarkis, ke ĝi jam dum unu jaro vaste malfermis ĝiajn paĝojn al la esperanta lingvo.

Per parolado de sinjoro Hagen la lernantoj kore dankis al la instruiston, sinjoro Pålŝen, transdoninte al li kiel signon de danko arĝentan florvazon kun rozoj.

Post la oficiala finigo de la kurso sekvis komuna kunesto kaj festo en la restoracio « Arcadia », kiu longe daŭris laŭ speciala permeso de la policestro. Dum la festo denove ankaŭ paroladis la policinspektoro kaj la redaktoro de la Polica Gazeto. Sinjoro Brochmann - Sletterød legis kelkajn el siaj plej bonaj historioj, tondre aplaŭdataj.

Aŭtune oni intencas arangi novajn kursojn inter policistoj ne nur en Oslo, sed ankaŭ en aliaj urboj de la lando.

La aldonita bildo prezentas la kursanojn kaj estas disponigita de la profesia poliefotografisto.

Tutkore ni dankas al niaj fervoraj pioniro en Oslo, kiuj donis al ni imitindan ekzemplon en la celo, dsvastigis nian helplingvon inter la policianaro.

A. Pohle, Liga redaktoro.

Esperantista vivo

Edziĝoj.

*** S-ro D-ro Ing. K.H. Friedmann, ano de UEA en Dresden kun F-ino Alse Homilius.

*** F-ino Erika Hessler, Filino de nia ano Paul Hessler, kun D-ro Wappler en Dresden.

Niaj Mortintoj

Kun sincera bedaŭro ni ricevis informon pri la morto de jenaj samideanoj. Al la familioj ni sendas la esprimon de niaj respektplenaj kondolencoj.

S-ro Vladimir Szmurlo, Riga 28.2.31.

Pioniro de l'unua jaro en Ĉelabinsk, Siberio.



VI. Szmurlo

(Nekrologo aperis jam en Aprila n-ro. paĝo 66).

S-ro L. W. Cronkhite, D.D., Delegito de UEA 1914-1919-1921 en Bassett, Birmo. Naskiĝis 1856 kaj laboris dum 25 jaroj kiel misisto baptista en Hindujo. Greenwich. (New York) 28.2.1931.

F-ino Carola Koch, N-ro 26536, D en Bad Soden im Taunus, German. Dum Majo 1931, sen pliaj informaj laŭ indiko sur reveninta gazetatekzemplero.

S-ro Alexis Voelker, Ano 15881, dum pluraj Subtenanto kaj Delegito en Meiningen, German. Lau reveno de gazetatekzemplero. Pliaj informoj mankas.

S-ino Marta Teresa Tanamaro, Direktorino de la Kampana Regiona Instituto en Napoli, Majo 1931.

S-ro Ernst Hembach. — Ano de UEA 32255 en Königsberg i. Pr. (sen pliaj detaloj).

Oni uzu Esperanton dum vojaĝoj!

La deĵorantaj fervojistoj plendas, ke ili malofte aŭdas de la vojaĝantaro pri nia lingvo. Eĉ direktoj kritikis tion! Pro tiu kaŭzo, kaj sciante kiom la uzado de Esperanto dumvojaĝe estas taŭga propagando por antaŭenpuŝi nian movadon, ni petas, ke ĉiu esperantisto Vojaĝanta eksterlanden rekte provu alparoli helplingve, kvankam li ne scias, ĉu la deĵoranto estras Esp. Antaŭ ĉio, oni demandu al ĉiu fervojisto aŭ poŝtisto: « Ĉu vi parolas en Esperanto? » Tiel ili konstatos ke Esperanto estas vera utilaĵo, kaj se ili ne konas ĝin, ili certe eklernos!

Plie dum skribaj interrilatoj kun la direktoj oni uzu ankaŭ nian lingvon postulante se la oficiala respondo ne estas en Esp. oni bonvolu aldoni tradukojn de ĝi!

Ĉiu esperantisto helpu tiamaniere al niaj klopodantaj fervojistaj samideanoj.

Svisa Asocio de Esperanto-Fervojistoj.

En kelkaj linioj



*** Eldona Societo Esperanto, Stockholm, Svedujo, jarkunvenis la 25an de Majo. La debito dum la jaro 1930 atingis 41,209 sved. kronojn kontraŭ 22,833 kronojn dum 1929. La Gajno-Perdo-konto bilancis je 7,982 kronoj kaj la Aktivaj-Pasivoj je 21,926 kronoj. La neta gajno dum la jaro estis 1,208 kronoj, kaj la jarkunveno decidis dividendon de 6%. La estraro ricevis deŝargon. La eksigantajn membrojn de la estraro, S-roj H. Halldor kaj A. Larson, oni unuvoĉe reelektis.

*** « Balkana Konkordo », N 5-6, majo-junio, 24-paĝa, kun multaj interesaj kliŝoj, dediĉita al balkanaj kuraĉlokoj kaj turistaj objektoj. Tre interesa kaj nepre havinda. Aparta numero 0.50 sv. fr. en internacia respondkupono de UEA; tutjara abono 4 sv. fr. Adreso: « Balkana konkordo », Sofia, Bulgarujo, Poŝtenska kutija, 233.

*** Eldona Societo Esperanto, Stockholm, Svedujo, eldonis novan serion de ses fotografaj poŝtkartoj el Stockholm kun sveda kaj esperanta teksto. La kartoj prezentas: Reĝa drama teatro, kaj la Strato Kungsgatan. La prezo estas po 0.15 sved. kr.

*** La aŭtoro de la unua mondhistorio en Esperanto (Jarmiloj Pasis) Sinjoro Hermann Haefker ricevis honordonon de Mil Markoj de la Saksa registaro pro tiu ĉi verko.

*** The British Esperantist, oficiala organo de la Brita E Asocio aperas nun sub alia formo kaj formato, 21,5 x 14 cm. La revuo International Language ne plu aperas aparte sed estas enkorpigita en la B.E.

Disko "La Espero"

Granda sukceso de la himno-disko. La unua serio de 500 diskaj jam elĉerpigis! Nova dua serio jam estas mendata. La disko trovis ĝeneralan aplaŭdon.. jen la prijuĝo de

Sinjoro Prof. O. Bujwid, Krakovo:

Aŭdinte vian gramofondiskon mi povis konstati, ke la Esperanto-himno estas bone ekzekutata kaj la kanto el la « Sorĉa fluto » bele kantita de bona kantisto. Estas dezirinde, ke la disko disvastiĝu inter diverslandaj rondoj.

Tial-gesmideanoj, sendu senprokraste vian mendon.

Komercesta Esperanto-Unio, Friedrich August Strasse 4. Dresden-Radebeul, German.

Vi volas gajni facile monon ?

Vi trovas plej efikajn konsilojn en
5 000 000
de Grenkamp

*

PILORIO

*

Ni avertas pri la firmo Bibliofila, posedanto samideano Henriko Fischer-Galati, Bukureŝto, strato Wilson 1. La firmo mendas librojn por komisiita vendado kaj rifuzas poste la pagon. Petoj restis fine sen respondoj, pago-promesoj ne plenumitaj Procesoj al la firmo estas laŭdire senfruktaj. Eldonejo Ferdinand Hirt & Sohn, Esperanto-Fako. Leipzig.

Tutmonda Esp. Kuracista Asocio Kunveno en Krakovo 1931

PROGRAMO

Tago : 6. de Aŭgusto 1931. Horo : 9.30 Antaŭtagmeze.

Ejo : Krakova Kuracista Hejmo (Dom Lekarski) Str. Radziwillowska (legu Radziwiłowska) N-ro 4.

1. Mallongaj salutparoloj.
2. D-ro Blassberg (Polujo) : Pri la antikva Krakova Medicina fakultato kaj mondfamaj Krakovaj kuracistoj.
3. Prof. Canulo (Italujo) : La medicino kaj medicinistoj en la nova itala Punleĝaro.
4. D-ro Bulgouszky (Hungarujo) : La patrino kaj suĉinfana prizorgo en Hungarujo.
5. Propra (senpaga) TEKA-ekskurso per aŭtobusoj al la moderna frenezulejo en Kobjejin apud Krakov.
6. Reveno al Krakov kaj komuna (senpaga) tagmanĝo por la TEKA-TEKA-noj anoncu sian aliĝon al la Sekretario de la Kongreso!
D-ro Blassberg.

SOMERA SURPRIZO

farigis la verkoj de la fama hungara verkisto.

KOLOMANO KALOCSAY

tradukinto de *Tragedio de l'Homme*
ĉefredaktoro de *Literatura Mondo*

Fine de Julio samtempe aperos la tri verkoj :

Streĉita Kordo originalaj poemoj de la verkisto. Vi trovos en ĝi la plej famajn poemojn: « La patrineco », « Pala procesio » k. a. 192 paĝa. Bindita P. 6.50 broŝ. P. 4.50

Rimportreto 55 portretoj de Esperanto-steloj el ĉiuj tendencoj de la movado, kun foto de la « steloj ». 128 paĝa. Bind. P. 5.— broŝ. P. 3.—

Lingvo, Stilo, Formo. Studoj pri Esperanto. La plej abundaj klarigoj pri la Esperanta versfarado rimaro, internacia stilo, pri la evoluo de Esperanto verkita de la plej fama nuntempa stilisto, 160 paĝa. Bindita P. 5.40 broŝ. P. 3.40

Al la prezoj aldonu 10. % por sendkostoj.

Rapidu mendu ĉe la eldonejo LITERATURA MONDO (Bleier Vilmos), Budapest IX. Boráros tér 6. IV. II.

(Hungara poŝtsparkasa konto Budapest, 25.168.) aŭ ĉe

Libroservo de UEA, 1, Tour de l'Île, Genève

Ekde Januaro 1930 aperas

UȘE - EȘO

la trimonata gazeto

Provekempleroj haveblaj ĉe « LIBRO »
Strada Lonovici 1, Timișoara, Rumanio, Banato.

INTERNACIA MEDICINA REVUO

Monata Faka Revuo.

Abono por tuta jaro : Unu usona dolaro.

20 rue aux Laines, Bruxelles, Belgujo

Korespondado

Interŝanĝo de objektoj

- Alger.** — S-ro René Coudroy, La Cité, rue d'Isly 26, PI bfl kun PM diversaj por afranko. K. ĉ. l. Certe respondos.
- Amsterdam (Nederlando).** — S-ro E. A. Zilver, Damrak 95, PM (Malakceptas bagatelaĵojn).
- Aosta (Italio).** — S-ro G-Sturmia, Convitto Nazionale, PI L., geografio, historio, kutimoj de Algerio precipe pri regularo kaj historio de la Fremdula Legio.
- Aussig.a. E. (Ĉeĥoslovakio).** — 36-jara fraŭlo, konstrufakano, deziras vlglan, leteran interkorespondadon kun samideanoj el la tuta mondo. Skribu al S-ro Franz Tischer, Dr. Schmeykastr. 6.
- Bakov nad Jizerou (Ĉeĥoslovakio).** — S-ro Václav Nechvilka, PI el ĉeturboj kĉl. Certe respondos.
- Berlin (German).** — F-ino Martha Lenk, S.O. 36, Falckensteinst r. 48. L. kaj P.K.F. k.ĉl. ĉiam respondas.
- Berlin (German).** — F-ino Katharina Lenk, poŝtistino, SO36, Falckensteinst r. 48. L. kaj P.F. k.ĉl. Tuja respondo-garantiata.
- Brandys nad Labem (Ĉeĥoslovakio).** — S-ro Zdeněk Prokop, el UEA, PM, PI, bfl.Gaz. nacilingvaj & esp. Letero per aerpoŝto same respondota. Ĉiam kaj tuj respondas.
- Braĥislava (Ĉeĥoslovakio).** — S-ro Emil Ott, ekskapitano, Gyŭrkovicgasse 8-a. PM. k.ĉl.
- Bruzelles (Belgujo).** — Kelkaj junuloj deziras korespondi L. PI. kun fraŭlinoj al ĉl. Skribu ol. Werner Verhaeghe 31. rue de l'Équité, Jette-Bruzelles.
- Budapest (Hungarujo).** — Korespondantojn seriozajn serĉas el tutmonda junularo : Hung. Esp. Skolta Rondo. V. Nagy-Sándor-6. ankaŭ PM — adreson bv. transdonu al loka sk. tr.
- Buenos Aires (Argentino).** — S-ro Rodolfe G. Bosch, Estados Unidos 2540. P.I. k.ĉl.
- Burgas (Bulgario).** — S-ro Vaŝil T. Ŝivaĉev, str. Pirotska 6, L., PI. pri diversaj temoj. Interŝanĝas ankaŭ PM. Nepre respondos.
- Bydgoszcz (Polujo).** — S-ro Potocki, gimnaziano, strato Pomorska 60, P. I. k.ĉl. Certe respondas.
- Ceuta (Hispana Maroko).** — S-ro Pedro Garcia, Falleres de la Puntilla, P.M. L. k.ĉl. germanoj, francoj, angloj kaj ĉeĥoj, nur kontraŭ ti respondkupono. precipe neuzitaj P.M. kontraŭ marokaj kaj his
- Cocentaina (Hispan. Alicante).** — F-ino Iluminada Albero, str. Santos Médicos 30, PI. k.ĉl.
- DÖBELN (German.).** — S-ro Hans Schmidt, Dr. Ziegerstrasse 4, sedos gekorespondantojn el ĉiuj landoj, por siaj lerantoj, policistoj fervojistoj, komercistoj; precipe por PI bfl. ankaŭ L kaj P.M.
- Gradisca d'Isonzo (Italio).** — S-ro Marino Di Bert, oficisto, Via Vitt. Emmanuele III. 66. L.P.I., ĉiam respondas (k.ĉl.)
- Hodonin (Ĉeĥoslovakio).** — S-ro Otakar Konecny, komerckomizo PI, L, kĉl. Certe respondas.
- Hodonin (Ĉeĥoslovakio).** — S-ro Ludoviko Irsik, librotlenisto kaj Del. UEA, Vystavní 24. PM., L, PI, kĉl. Tuja respondo garantiata.
- Jelenie poŝto Kraszewice (Polujo, Pow. Wielun).** — S-ro Marjan Tyszkiewicz, instruisto, L., PI., fotojn naciajn kantojn, popolkantojn kaj muzikoj. Pri naciaj literaturo kaj moroj kaj fotografado.
- Landeshul Schles. (Germanujo).** — S-ro A. Baumgart, Postfach fotoĵojn, PI b.f.l. k.ĉl. prefere kun gestenografistoj laŭ sistemo : Duployé. Flageul.
- Leningrad 11 — (U.S.S.R.).** — S-ro S. D. Ivanov, ul. 3 Julia 15, kv. 42. — Deziras korespondi kun samideanoj ludantaj ses-kordan (hispanan) gitaron, el tuta mondo.
- Litovel na Morave (Ĉeĥoslovakio).** — S-ro Miroslav Parizek, ucen u fy St. Parizek PI, L, PM kĉl po 100-200 grandvaloraj. Respondas tuj kaj certe.
- Lisboa (Portugal).** — S-ro José G. F. Murcias. R. Joaquin Casineiro 60-3-o PI., L. PM. ĉ. l.
- Marseille.** — F-ino G. Baude, 18 rue St. Pierre, PI., bfl. L.k.ĉl.
- Mikstat (Pol.).** — S-ro Edward Cholewinski, PM k.ĉl.
- Montevideo (Urugvajo).** — S-ro Juan Sarachaga, strato Civicos, 2700 deziras korespondadi per ilust. p. k.
- Montevideo (Uruguay).** — José B. Tutzo, str. Sarmiento, 2404. — Interŝanĝas PM de la tuta mondo.
- Ninove (Belgujo).** — S-ro Georges Rogiers, Chaussée d'Alost, deziras korespondi PI. L. kĉl. Certe respondos.
- Novi-Sad (Jugoslavio).** — S-ro Jozef Vécseu, Nemačka ul. 37. PI. urbvidajojn bfl. k.ĉl.
- Panevezys (Litovio).** — Fino Laurinavičiute Jadze, telefonistino, PI. k.ĉl.
- Panevezys (Litovio).** — F-ino Zaliauskaite Juze, poŝtoficistino. PI.
- Panevezys (Litovio).** — F-ino Vertelkaite Brone, telefonistino, PI.
- Panevezys (Litovio).** — F-ino Vycaite Natalija, telefonistino, PI.
- Panevezys (Litovio).** — S-ro Stepukonis Mikas, poŝtoficisto, PI.
- Peoria-Illinois (U.S.A.)** — S-ro Paul Satchfield, 1127 Melbourne Street PI. L., precipe kun junuloj.

- Plock (Polujo)** — S-ro M. Moszkowicz, ul. Szeroka 51, PI., k.ĉl.
- Praha.-XI.** — S-ro Ant. Alexander. Jicinská. PI. k.ĉl. kaj etnografiaj informoj.
- Reghin (Ruman.).** — S-ro Aleksandro Birthler, str. Garej 26, 30 jara L PK kun lertuloj en Esp. kaj angla.
- Reichenau bei Gablonz a.d.N. (Ĉeĥoslov.).** — F-ino Kamilla Schulz, VD de UEA mil nedifektitaj kurantaj ĉeĥoslov. PM kontraŭ sama kvanto ĉiulanda speciale nordlandoj kun seriozaj filatelistoj. L pri div. temoj. Nepre respondos.
- Salonta (Ruman.).** — S-ro Ludoviko Orendy, jud. Bihor, Calea Carol II 5, deziras korespondadi kun fotografistoj amatoraj (inoj) pri foto temoj kaj interŝanĝi amatorajn bildojn.
- San Carlos (Urugvajo).** — F-ino Maria Rufa Castro. Deziras korespondi per Ilustritaj p. k.
- Sapporo (Japanujo)** — S-ro Kusuo Acumi, Kita 5, Niŝi 20; Inĝeniero de Agrikul. Eksperimentejo; L., kaj PK. Pri Agrikulturo precipe pri Hortikulturo.
- Serrières (Svislando)** — S-ro Emmanuel Zurcher, deziras korespondi kun instruistoj japanaj kaj ĉinaj pri laboroj koncerne la edukadon de la infanoj.
- Scheveningen (Nederlando)** — S-ro Alex Belinfante, van Dorpstraat 24, PI L k.ĉl.
- Tomsk (Siberio)** — S-ro Aurenus Anatol, Zateevskij per. 3., kv. 13. Artaj PI (naturbildo, skulptaĵoj k.s.)
- Venlo (Nederlando).** — B. Hendrix, Slooterbeekstraat 30, Arĥitekto, deziras interŝanĝi arĥitekturajn (presajn, fotografaĵojn) kaj korespondadon pri moderna arĥitekturo.
- Warszawa (Pol.).** — F-ino Erna Finkelkraut, Polna 66. m. 1, PI., L. kun kleraj kaj inteligentaj partoprenontoj de la 23-a kongreso.
- Włodzimierz (Pol.).** — S-ro E. Krajewski, florkulturisto, PK pri florkulturado, lingvistiko kaj meteorologio.
- Zaragoza (Hispano).** — S-ro Alfonso Perez, Estebanes 9-2, PI L k.ĉl.
- Zeulenroda (Germanio)** S-ro Erich Böhnhardt (ŝparkaso) 23j. komen-canto PI .

WIESBADEN AM RHEIN

Rekomendindaj Hoteloj...

HOTEL QUISISANA,

gvidanta domo plej bele kaj trankvile situata, vid-al-vide al la kuracdomo kaj al la kuracgardeno, ne tuŝata de la trafikbruo, sed tamen centre. 120 ĉambroj kun fluanta varma kaj malvarma akvo. 50 banĉambroj de 6.— ĝis 12.— Mk. Pensiĝo de 13.— ĝis 20.— Mk. Telefono: 59 231. Telegramadreso: Quisisana, Wiesbaden Posedanto: *Gefratoj Roser.*
(*Esperanto parolata.*)

TAUNUS HOTEL,

posedanto Georg Paetzold. Unuaranga moderna domo en al freska situo, sudflanko vid-al-vide al parkaĵo. 150 litoj, fluanta akvo, privataj banoj kaj tualetejoj, ŝtatelefono en la ĉambroj, konferenc-salonoj, eleganta restoracio kun artista koncerto, moderna aŭtomobilejo kun 20 unuopaj kestoj en la hotelo. ĉambroj de 4.— Mk., Pensiĝo de 9.— Mk. Telefono: 21051.

HOTEL BADHAUS KRANZ,

ĉe Kochbrunnen. Kurac-banoj, fluanta akvo. lifto, centra-hajtado. Ĉambro kun matenmango kaj termalbano, 5-6 Mk.

HOTEL NIZZA,

posedanto E. Upleger. Moderna domo proksime ĉe Wilhelmstrasse kaj la kuracparko. Fluanta akvo. aŭtomobilejo. Moderaj prezoj.

SCHWARZER BOCK,

Hotel am Kochbrunnen-Badhaus. 280 litoj, ĉiu komforto. Pensiĝo inkluzive termalbano 10.— Mk. Posedanto Th. Schäfer.

Petoj kaj Proponoj

INTERNACIA KOMERCO

Adresaro. — Nia nova « Adresaro 1931-32 » aperis; ĝi enhavas la precizajn adresojn de la geliganoj en 122 diversaj lokoj. La adresaro kostas inkluzive afranko unu poŝt-aŭ UEA-respond-kuponon. Sudokcidentgermana Esperanto-Ligo (SOL) Wiesbaden (Germanujo)

Adresŝanĝo. — S-ro Mikkel Jürgensen, informas gekorespondantojn pri sia nova adreso: Virulane, Rakvere (Estonio)

Cu vi estas muzikemulo? — Por du svisaj Frankoj mi sendas afrankite du kantojn, unu meza voĉo kaj piano, pri poemoj de Gala Petrova, originalajn komponaĵojn. (Plimulligita manuskripto sed bone legebla) Kurt Haefeker, Im Sorenfelde 2, Hamburg-Volkendorf (Germanujo).

Fotografajojn, Malfacile Akireblajn pri popoivivo pejzaĝo, religio, politiko, sperto, virinoj, infanoj, antikvaj kaj modernaj belartoj (ekz. artpentraĵoj, ideografajoj, religiaj skulptaĵoj) kaj ĉiuj aliaj interesaj de leviganta kaj en la europaj kaj amerikaj okuloj mistera Ĉinujo volas liveri ĉina amatorfotografisto al ĉiulandaj bild-jurnaloj kaj — gazetoj Esperantaj kaj nacilingvaj kontraŭ rekompenco. Oni rajtas traduki la Esperantan klarigan en nacian lingvon. Kiajn fotojn vi bezonas, petu ĉe S-ro Naŭu Cangia Fu, del. de UEA, 67 Yawyiwan, Chinkiang, Ĉinujo.

Gejunuloj atentu. — Pro granda amaso da ricevitaj adresoj mi ne povas tujpublikigi ĉiujn. La porjunulan gazeton mi sendas nur intersange je via (nacia). F-ino Julie Šupichová, instruistino Mala Štěpánská 6, Praha II, Ĉeĥoslov.

Helpe. — Kiu franca samideano ebligis al senlabora germana bank-oficisto 24 jara senpagan restadon aŭ volontulan laboradon por perfektigi en la franca lingvo. Skribu al: Konrad Henkel, Laimnau bei Tettnang, German.

Kuracisto universala, serĉas korespondadon seriozan por eventuala posteno, speciale en la fakoj nerva, psikologia kaj dentista. Se eble en Nord — aŭ Sud — Afriko, Sudameriko, Aŭstralio. D-ro Jozef Komlossy, Nagykallo, Hungarujo.

Letervesperon aranĝas societo — Esperanto Rondo, en Asch, fine de Aŭgusto 1931. Ĉiulandaj gesamideanoj sendu Pl., L., laŭ adreso de S-ro Rudolf Hollerung, Bürgerheimstrasse 1815, Asch Ĉeĥoslovakio. Respondo garantiata.

Mahnovaj numeroj de « Esperanto ». — La numeroj 190 (6), 191 (7) 192-8, 193 (9) 194 (10), el la jaro 1916 estas serĉataj de S-ro Alexander Weisz, del. de UEA en Banska Bystrica, Slov. Ĉeĥoslovakujo Rekompenco laŭ interkonsento.

Okulsciencistoj. Ĉiuj, kiuj okupiĝas pri optiko kaj okulscienco estas petataj skribi al mi siajn adresojn. Se sufiĉa intereso montriĝos, oni intencas fondi internacian grupon kun la celo akceli la enkondukon de nia lingvo en okulsciencajn rondojn. Por ĉi tiu celo estas nepre necesa multnombra subteno. Skribu al Edward W. Woodruff, 56, Falmouth Road, London, S.E.1. Anglujo. Aliaj gazetoj bonvole represu.

Restad-interŝanĝo. — Ĉu mi trovas samideanojn en Francujo, Sud-slavio aŭ Italio ĉe kiuj mi povus travivi senpage unu semajnon de mia libertempo? Kontraŭ tio mi invitas plenumonton, travivi samkondiĉe aŭ pli longan tempon en ĉeĥoslovaka submontara regiono. Seriozajn proponojn sendu sub « Serioze » al la redakcio de Esperanto, kiu ĝin postsendos al mi.

Raportado. — Por la esp. kolono en ĵurnalo « Ĉerno More » mi bezonas informojn pri la esp. movado de ĉiuj landoj, ŝtatoj, urboj. Per tio mi konatiĝas speranton al la legantaro de la gazeto, kaj kreas intereson al nia afero. Adresu: Georgi Sapungief, Vicdelegito de UEA, Boteva 59, Varna, Bulg.

Soldatservo. — Pro foresto de Majo ĝis oktobro en militservo, Delegito de UEA en Jyderup Danlando, S-ro Erik Pedersen ne povas plenumi la taskon de Delegito.

MONDA BANLOKO KARLSBAD

Kafejo kaj restoracio « Schweizerhof », Karlsbad
Sin rekomendas al estimataj gastoj. — Bonega kuirado
Kusaĉa kuracado.

Ĉiam granda subĉiela koncerto.

Unua vegetara manĝejo

Kafejo Klement, Karlsbad

apud la doganoficejo.

Konata maten-manĝejo kaj restadejo posttagmeze.

HOTELO " PARADIES "

KARLSBAD

vid-al-vide de l'kuracdomo (Kurhaus)

Tutjare malfermata.

Passage - Keller, Karlsbad

Hauptstrasse

plej konata restoracio. Menuo - Koncerto.

KAFEJO-RESTORACIO

" Sanssouci ", Karlsbad...

Konata kunvenejo de dancemuloj.

Montara Kafejo kaj restoracio

" Hirschsprung " Karlsbad

Sin rekomendas ĥortlezie.

DUA TURISMA KARAVANO AL ITALIO

20a ĝis 28a de Julio 1931

Milano - Alpaj Lagoj - Verona - Venezia

Tre komforta aranĝo : 520 aŭ 780 Liroj. Petu prospekton.

ESPERANTO, Galleria Vitt. Emanuele 92, MILANO

NOVA VERKO PRI LA VIVO KAJ MOROJ EN ARKTIKAJ REGIONOJ.

Tridek jarojn en la ora nordo ?

de J. WELZL.

Mallonga enhavo de la verko estas jena:

Welzl estante junulo foriris el sia hejmo, piede li marŝis al Genova, de tie li veturis al Ameriko kaj reen preter Afriko kaj trans la Hindan Oceanon al Vladivostok kaj poste al Irkutsk, de kie li piediris trans Siberion ĝis la Arkta Maro kaj ekloĝis sur la insulo Nova Siberio inter Eskimoj, kie li ĉasis kaj negocis, akiris konsiderindan havaĵon kaj fine oni elektis lin landestro.

320 paĝoj: 22 cm. alta, 16 cm. larĝa. Eldonis Moraviaj Esperanto Pioniroj, Olomouc.

Prezo: Broŝurita: Frk. sv. 5.50; Bindita 6.60 Frk. sv.


Mendu ĉi tiun legindan verkon ĉe la :

Internacia deponejo komisia

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO (Libroservo)

1, Tour de l'Île, GENEVE, Svislando.

Jen la plej efika propagandilo !

Sigelmarkoj en sep lingvoj !

Por doni al la gesamideanoj bonan kaj efikan rimedon propagandi nian lingvon inter la publiko, ni eldonis sigelmarkojn kun nacilingvaj tekstoj en la lingvoj

angla, esperanto, franca, germana, hispana,
itala kaj sveda.

Ĉiu serio havas alian koloron kaj la unuopaj markoj estas trikolore presitaj en formato de 3,5 × 5 cm. La prezo por 10 folioj estas Gmk. 0.50, 50 folioj Gmk. 2.25 kaj 100 folioj Gmk. 4.—.

Mendu ĉe « *Heroldo de Esperanto* », Librofako, Brüsseler Str. 94, KOLN (Germanujo).

**LA DOGMARO PRI LA VIVO** EMANUEL SWEDENBORG

Petu senpagan ekzempleron ĉe
SWEDENBORG SOCIETY (Inc.)

20 Hart Street, London, W.C 1.,

60 paĝoj,
broŝuritaj.

Anglujo.

Ĉiu ĉi tiun
gazeton.**Sporto - Mondlingvo - Mondpaco**

Detalan artikolon poenttabeloj de gimnastika direktoro
Blomberg vi trovos en la Aprila numero de
INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Jarabono de IPR nur 1 dolaro aŭ samvaloro. — Spe-
cimenan numeron petu kontraŭ respond-kupono de la

Administranto Kurt Hofman,

Felgenhauerstr. 63, RIESA (Germ.)

NOVE ELIRONTA BENSONA VERKO METODO, KRESTOMATIO, VORTARO,

500 PAĜOJ FORMATO 8-26 cm. 10145 BILDOJ, 40 LINGVOJ

La unua kaj sola universala, kompleta, rekta metodo, kiu iam ajn aperis en iu ajn lando aŭ lingvo. La verko konsistas el tri partoj, lukse binditaj en unu grandioza, grandformata libreto.

La unua parto prezentas la jam bone konatan rektan bildmetodon « Universala Esperantistigilo », relaborita kaj plibonigita per multaj novaj bildoj, legekzercoj por komencantoj kaj la prononcado de la esperanta alfabeto en multaj diversaj lingvoj. La amplekso de tiu ĉi parto estas nur unu deko de la volumo.

La dua parto prezentas ampleksan krestomation, kiu enhavas pli ol 100,000 vortojn de la plej bonaj elektitaj rakontoj, fabeloj, humorajoj, versaĵoj k.c. La materialo por ĉi tiu parto estis ĉerpita el la gazetoj « Esperanto », « Heroldo de Esperanto », « Sennaciulo », « La Lernanto », « Verda Stelo », « Esperanto Junularo », « Literatura Mondo », kaj preskaŭ la tuta enhavo (rakontoj kaj legajoj de la gazeto « Lingvo Internacia » de la tuta jaro 1896.

La tria kaj plej grava parto, kies enhavo prezentas ses dekonon de la libreto, estas **PLENA UNIVERSALA VORTARO**. La sola vero universala vortaro, kiu iam ajn aperis, ĉar la vortoj estas difinitaj per bildoj komprenataj en ĉiu lando, de ĉiu nacio, kaj de ĉiu aĝo. Ĉi tiu parto de la volumo konsistas el pli ol 300 kvarkolonaj paĝoj kaj enhavas pli ol 8000 speciale desegnitajn klarigajn bildojn.

Jen do, vortaro, kiu ekinterosas la leganton kvazaŭ li legus interesantan romanon. Jen vortaro, kiu servos, ne nur, por trovi la difinojn de esperantaj vortoj, sed ankaŭ por amuziĝo dum libera tempo. Foliumente la paĝojn, vi trovas bildojn interesajn, instruajn, komikajn, problemajn, humorajn, enigmajn, enspirajn, surprizajn k.c., k.c. La bildoj elvokas jen ridon, jen pripenson, jen divenon, jen miron, jen... Sed lasu min doni al vi kelkajn detalojn. Mi diras « kelkajn », ĉar priparoli ĉiujn estas neeble en ĉi tiu spaco.

La vortaro enhavas, ne nur la kvar mil radikojn aprobitajn de la Lingva Komitato, sed ankaŭ 1,500 aliajn sciencajn kaj teknikajn vortojn. Krom la bildklarigoj, la plejmulto de la radikoj estas ankaŭ difinitaj per esperantaj klarigoj kaj esperantaj frazoj. Al la pli ol 5,500 radikoj estas aldonitaj miloj da aliaj pretaj vortoj klarigitaj per bildoj. Jen ekzemploj: sub la radiko « Ŝraubo » troviĝas 9 bildoj — nome — Ŝraubo, Ŝraubingo, Ŝraubnajo, Ŝraubrelo, Ŝraubturnilo, Ŝraubmezurilo, Ŝraubigilaro, Ŝraubborilo, Universala Ŝraubturnilo. Sub la radiko « Mano » troviĝas 7 bildoj — Mano, Maneto, Manumo, Manplato, Mandorso, Manpremi, Enmanigi. Sub la radiko « Manĝi » troviĝas 7 bildoj — Manĝi, Mangas, Mangajo, Mangemulo, Mangotablo, k.c., k.c.

Sed jen la plej grava. El la tutaĵo de la esperantaj radikoj mi elektis 1070 radikojn, kiuj estas la plej ofte uzataj dum ĉiutaga vivo kaj klarigis ilin per 40 lingvoj. T. e. ĉiu el la elektitaj 1070 radikoj estas difinita krom per la klarigaj bildoj, ankaŭ en 40 diversaj lingvoj. Ĉiu lingvo estas markita per numero. Ekzemple: la Germana lingvo havas ĉiam la numeron 9, la Ruĝa 16, la Estona 26, la Japana 40, k.c. La numeroj ebligas la tujan trovon de la nacia difino de la esperanta radiko. Jen estas la 40 lingvojn: Angla, Franca, Hispana, Itala, Portugala,

Latina, Kataluna, Rumana, Germana, Holanda, Dana, Norvega, Sveda, Juda, Pola, Rusa, Bulgara, Serba, Rutena, Bohema, Slovaka, Slovena, Kroata, Hungara, Albana, Estona, Fina, Himra, Latva, Litova, Islanda, Flandra, Romanĉa, Turka, Malaja, Greka, Persa, Araba, Hina, Japana. La Prepozicioj, Adverboj, Prefiksoj, Sufiksoj kaj multaj aliaj vortoj estas krom tio klarigitaj per multaj esperantaj frazoj ĉerpitaj el la « Fundamento ». Ekzemple — la prepozicio « En » havas 28 frazojn, la adverbo « Pli » havas 15 frazojn, la prefikso « Mal » havas 20 frazojn, la sufikso « Ig » havas 25 frazojn, k.c., k.c.

Al la radikoj esprimantaj sciencojn, artojn k.c. estas aldonitaj bildoj de famuloj. Ekzemple: sub la radiko « Hemio » troviĝas la bildoj de la Hemiistoj Lavoisier, Dalton, Davy, Berthelot, Gay Lussac, Berthelot. Sub la radiko « Filozofo » troviĝas la bildoj de la filozofoj Aristotele, Sokrates, Plato, Spinoza, Schopenhauer, Kant. Sub « Komponi » la bildoj de komponistoj Wagner, Dvorak, Mendelsohn, Gluck. Sub « Esplori » la bildoj de esploristoj Columbus, Cabot, Magelan, Andréo, Byrd. k.c., k.c. entute ĉirkaŭ 300 bildoj de historiaj famuloj en diversaj fakoj de scienco, arto, industrio, religio, politiko, k.c., k.c.

Vi ankaŭ trovos multajn bildojn el la mitologio kaj multegon de varispecajn bildojn de la sciencoj, artoj, metioj, kaj industrioj, tro multe por menci en ĉi tiu spaco.

La formato de la originalaj paĝoj estas multe pli larĝa ol la paĝoj de la presota libro, kaj nur dank al tio mi povas enmeti tiom da materialo en nur kvincent paĝoj.

Laŭ la opinio de kelke da personoj, kiuj vidis la originalajn paĝojn, la prezo de la verko estu minimume 25.00 dolaroj, ĉar la preparo de tiuj forprenis, ne nur, multajn milojn da dolaroj, sed ankaŭ jarojn de tre malfacila laboro. Tamen mi decidis, ke la verko kostu ne pli ol kvin dolaroj, eble eĉ kvar. Tio tute dependas de la estontaj elspezoj por fari la klišojn, la presado kaj bindado de la verko.

Kiel ajn, ni nun anoncas favoran prezon de tri Usonaj dolaroj al ĉiuj, kiuj sendos la monon antaŭ ol la verko estas presita. Kaj mi promesas resendi unu dolaron en okazo, se mi decidis, ke la prezo de la verko estu nur tri dolaroj.

Ĉar la laboro forprenas mian tutan tempon, kaj mi en nenia maniero povas ŝpari tempon por respondi demandojn, mi estas devigita peti la mendontojn kaj interesulojn, ke ili ne skribu longajn leterojn. Nur sendu poŝtmandaton por tri dolaroj kune kun via adreso skribita per presliteroj kaj tio sufiĉas. Mi sciigos la ricevon de la mendo per poŝtkarto. La verko estos tute finita antaŭ la fino de la jaro 1931. La progreso estos anoncita de tempo al tempo.

Mi ankaŭ petas la redakciojn de esperantaj gazetoj (escepte tiuj jam menciitaj) ke ili elektu bonajn varispecajn legajojn presitajn en iliaj gazetoj, kaj sendi tiujn al mi, por ke mi povu pligrandigi la krestomatian parton de la verko. La nomo de la verkisto same kiel la nomo de la gazeto aperos sub ĉiu legajo. Por la sama celo mi ankaŭ akceptos originalajn aŭ tradukitajn legajojn de verkistoj, sed en tiu okazo la manuskriptoj devas esti manuskribitaj. La nomoj de la verkistoj aŭ tradukistoj aperos sub ĉiu legajo.

Ankoraŭ unu fojon mi petas:
NE SKRIBU LETEROJN KUN DEMANDOJ, ĈAR MI NE HAVAS TEMPON POR RESPONDI.
BENSON SCHOOL OF ESPERANTO, 719 HIGH STREET, NEWARK, NEW JERSEY, USONO.

